

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

IPR

**Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj**

ILEI

Jarkolekto 4 N-ro 3, Novembro 1974

Rotterdam

Enhavo	Paĝo
Karin Ruff: IPR pri si mem	77
Helmut Sonnabend: Deklaro de la prezidanto de ILEI pri la ekŝigo kiel aliĝinta faka organizo el UEA	78
25 jaroj ILEI	79
D-ro M. Dazzini: ILEI-Konferenco en Internacia Domo Sonnenberg de la 17a ĝis la 26a/7/1974	85
Helmut Sonnabend: La lerneja aplikado de Esperanto-instruado	91

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)

Aperas trifoje jare

Abonprezo 8,- guldenoj, unuopa kajero 3 guldenoj

Provizore redaktis: Helmut Sonnabend
Im Eckerkampsfeld 11 a
D-3161 Dollbergen

Kontoj: 1.) ILEI-IPR
25.28.71.464-40
Bank Mees & Hope NV
Rotterdam Coolsingel 93
2.) Helmut Sonnabend - Sonderkonto
Poŝtĉekkonto n-ro 3245 66-309
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikitaj kontoj.

IPR – Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR- ebligaj abonojn en landoj havantaj valutajn problemojn- kreado de infanliteraturo- verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71. 464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.

IPR pri si mem

de Karin Ruff, komisiitino pri IPR

Kun tiu ĉi numero kompletigis la unua jarkolekto de IPR post ĝia transprenado en propran region. La starto estis sufiĉe komplika, ĉar estis perdiĝintaj la plimulto de niaj abonantoj. La provnumero iom helpis regajni novan bazon. Ĝi estis senpaga kaj ni pagis la fakturon nur helpe de grandanimaj donacintoj. Al ili meritas la aparta danko. Ĝis nun abonis nian organon ĉirkaŭ 700 gekolegoj, tamen konsiderante nian membran staton, mi opinias la abonanta stato devas pli multnombriĝi.

Bedaŭrinde ĝis nun ni ne trovis solvon abonigi niajn kolegojn en socialismaj landoj. Laŭ miaj informoj eĉ ili ne ricevis la provnumerojn, kvankam mi sendigis pli da specimenoj al la sekcioj ol ili havas membrojn. Diskutoj pri eventualaj kontoj en tiaj socialismaj landoj ne donis praktikan solvon, ĉar la ekspluatado de kontoj ne estas klaraj. Konsiderinda ebleco estus, ke la sekcioj en socialismaj landoj ricevus la permeson pagi per valutoj rekte al IPR-almenaŭ parte, la reston oni povus kompensi per pedagogia literaturo, kiu estus pli facile vendebla ĉe niaj membroj. Mi atendas la respondojn de miaj ŝatataj gesekcioj.

Kelkaj gekolegoj kaj sekcioj krompagis por gekolegoj en socialismaj landoj. Venontjare mi sendos rekte la kajerojn al la donacoj, petonte ke ili sendu mem al deziritaj personoj. Tiel ekestos ankaŭ personaj rilatoj kaj mi povos pli bone eluzi mian tempon.

Nun pri kelkaj administraj ŝanĝoj. Ĝis nun mi skribis por ĉiu abonanto la adresan slipon. Pro la ĝojinda kresko de abonantoj tio ne plu eblas. Mi opinias ke nia organizaĵo pere de la sekcioj povos ekonomie solvi por ĉiuj la problemon. Jen du taŭgaj solvoj:

1. Ĉiu sekcio ricevos la tutan pakajon sen la privataj adresoj kaj adresos mem la kovertojn kaj dissendados.

Avantaĝoj:

1. IPR ŝparos la monon por afrankaj kostoj kaj povas teni la prezon.
2. La sekcioj povas samtempe en la sama koverto doni sekciajn informojn kaj tiel ekspluati la afrankajn kostojn ĝis maksimumo.
3. Tiamaniere abonigis ankaŭ la aliaj membroj, ĉar la oficialaj informoj estos ĉiam aldonitaj al IPR.

2. Sekcioj deziras rektan sendadon al la abonantoj. Tiu kaze la sekcioj sendu la pretajn slipojn rekte al la komisiitino-do al mi. Mi plusendos al la presejo. Ĉiam estas apartaj kostoj.

Mi atendas vian decidon, ĝis la 15a de januaro 1975. Se ne estos respondo, mi rekte sendigos la kajerojn al la sekcioj. Tiu ĉi numero estis provizore redaktita de s-ro Sonnabend, ĉar la ĝisnuna redaktoro s-ro Huapenthal abdikis. Nova redaktoro por almenaŭ la nova jarkolekto estos s-ro G. Turin, nia kolego en la estraro. Al li estos sendataj ĉiuj manuskriptoj kaj informoj. La sekcioj estas urĝe petataj nomigi komisiitojn, kiuj kunlaboros kun la redaktoro kaj regule sendos materialon, i.a. informoj pri la sekcio vivo.

Por elĉerpi ĉiujn eblecojn de la informado mi varme rekomendas, aboni ankaŭ *Mundo'n*. S-ro Svantesson estas la redaktoro kaj eldonanto. Inter IPR-numeroj iros freŝaj informoj ĉiam al *Mundo*.

Venontjare aperos IPR trifoje. Mi petas la sekciojn ĝis meze de januaro ĝiri la abonprezojn al unu el la indikitaj kontoj sur la dua kovrilpaĝo. Ne forgesu nian fonduson!

Deklaro de la prezidanto de ILEI

pri la eksiĝo kiel aliĝinta faka organizo el UEA

ILEI bezonas por plenumi siajn multflankajn taskojn la subtenon kaj kunlaboron de multaj aliaj. Ni havas kontaktojn kun UNESKO, kun sindikatoj kaj esperantistaj unuiĝoj. Ni subtenas la agadon de niaj amikoj en la "Eŭropo-Agado", ni serĉas kontaktojn kun la UNESKO-sekcioj en niaj membraj landoj. Bonaj rilatoj kun SAT, TEJO kaj UEA povas esti tre utilaj.

Nia historio montras, ke inter UEA kaj ILEI ĉiam estis kontentigaj rilatoj ankaŭ sen aparta stato. Iam ILEI akceptis la kunlaboran staton de UEA. La komitato de UEA pruvis sian sinceran intereson per tio, ke ĝi regule akceptis ILEI-anojn en sia mezo. Evidentiĝis, ke la nova estraro de ILEI sub la energia gvidado de sia prezidanto s-ro R. Markarian donis al ILEI modernan direkton, konsiderante la nunajn aspektojn en la mondo. Pro tio ankaŭ en la UEA-gvidado la interesiĝo al pli profundaj rilatoj kun ni. Siatempe UEA, sub la gvidado de prof. d-ro I. Lapenna, likvidis ĉiun propran laboron rilate lernejojn. Gravaj lernejaĵ eksperimentoj en Eŭropo, novaj paŝoj al aliaj eksperimentoj, la komenciĝanta diskuto pri Esperanto en la primara ŝtupo de la lernejo substrekas la pravan prijuĝon de la konsekvenca agado de ILEI.

ILEI jam nun estas organizo, kies partnereco por ĉiu estas valora kaj avantaĝa.

Mi, la nuna prezidanto de ILEI, serioze kredis, ke ILEI devus fari la duan paŝon al UEA por fortigi la gravan mondan organizon kaj plibonigi nian pozicion, sciante ke UEA kaj aliaj nur tiam povas prosperi, kiam estas forta ILEI.

Do, fine mi sekvis la sugestojn kaj konsilojn dum pluraj privataj konversacioj kun R. Markarian kaj proponis al estraro kaj komitato de ILEI la aliĝon. Nia decido ne estis unueca.

Mi defendis mian proponon, dirante, ke ni en la komitato de UEA povus certe trovi subtenon en nia laboro kaj UEA POVUS MALFERMI AL NI multajn oficialajn pordojn kaj ekspluati niajn sukcesojn sur scienca kaj lerneja kampo.

En Hamburgo la prezidanto de UEA, prof. d-ro Lapenna informis la komitaton (sume de A plus B) pri nia aliĝo. Sen rimarkebla reago ĝi notis tion.

Kiam ILEI prezentis kaj proponis siajn kandidatojn (ni proponis d-ron Dazzini kaj s-ron H. Behrmann), la plimulta grupo malakceptis nian proponon kaj ne elektis niajn proponintojn.

Gekolegoj, tio ne estis normala baloto. La plimulta grupo eljetis ĉiujn spertulojn el la komitato kaj alelektis t.n. junajn homojn, ĉe kiuj krom la aĝo nenio estas juna. La plimulta grupo (ĉiuj anoj antaŭe estis programitaj) sekvis nur unu solan planon: eviti ĉion kio povus ĝeni la faligon de Lapenna por transpreni la potencon el difuzaj kaŭzoj.

En tiu luktado ILEI fariĝis viktima objekto de "honestindaĵ" gesinjoroj kvankam grupanoj hipokrite asertis, ke la agado ne estis kontraŭ ILEI!!! La sinteno de s-ro d-ro Tonkin restis indiferenta.

Analizante la eventojn mi antaŭmetis miajn konkludojn al estraro kaj komitato (en Hamburgo) kaj proponis la tujan eksiĝon kompletan el UEA. Post longa vigla debato la komitato sekvis mian proponon.

Tiu bedaŭrinda eksiĝo estis necesa. Nia memestimo postulis tion!

25 jaroj ILEI

En tiu ĉi jaro nia organizaĵo ekzistas 25 jarojn. Kiam mi volas kompari nian aĝon kun tiu de junulo ni povus aparteni al junul-organizaĵo kiel TEJO. Per tio ĉi mi nur volas substreki nian brilan junecon, nian vitalan forton, nian dinamisman impeton kaj ankaŭ nian neoportunecon en nia agado.

Kiu volas ekkoni sian pozicion devas iam post iam retrorigardi sian faritan vojon.

Laŭ internacia revuo *Esperanto* de majo 1947 (p. 70) post intertraktado inter diverslandaj instruistfakoj oni decidis starigi centran organizaĵon por provizora internacia kunlaborado: Internacia Instruista Kunlaborado (I.I.K.). La komitato konsistis el f-ino V.C. Nixon (Anglujo), f-ino Dedieu (Francujo, s-ro P. Korte (Nederlando) kaj s-ro E. Dahl (Svedujo). Centran informojn gvidis s-ro E. Dahl en Uddevalla por kolekti informojn el ĉiuj landoj pri instruistaj, pedagogiaj kaj lernejaĵ aferoj en rilato kun Esperanto la gazetaron, landajn instruistajn organizaĵojn, krome respondi al demandoj pri lernejaĵ agoj, pri Esperanto-kaj -lernejo. La komitato havis reprezentantojn en 17 landoj, el kiuj raportoj venis de Francujo, Britujo, Nederlando, Maroko, Germanujo kaj Polujo. Aŭdiĝis plano okazigi en 1948 internacian instruistan kunvenon kaj porinfanan restadon en Svedujo. Rezolucio dissendita invitis la pedagogian mondon, akceli la lernadon de Esperanto (jarlibro '47 II p. 34-43 entenas liston de lernejoj en kiuj oni instruis Esperanton). Sed jam en la UK '48 en Malmö la temo estis realisma: Kiel pli bone agi por akceptigi Esperanton en la lernejo? I.I.K. petis informojn laŭlande kaj loke: kie Esperanto estas instruata, ĉu deviga aŭ libervola fako, kiom da gelernantoj, ĉu komunumo/ŝtato subvencias, per kiom da sumoj.

En la UK de Bournemouth ('49) oni akceptis statuton de la organizaĵo, nomata de tiam Internacia Ligo de Geinstruistoj Esperantistaj (*ILGE*, tamen laŭ la jarlibro '50 I, p. 58/9: ILEI). En 1950 la UK mem traktis "Esperanto en la lernejoj" en la Unua Sekcio.

1950 okazis la unua Internacia Pedagogia Seminario en Kochel am See (Georg v. Vollmar Schule en kastelo Aspenstein) en Bavarujo, 26 julio ĝis 4 aŭg. Partoprenis 21 geinstruistoj el Britujo, Francujo, Germanujo kaj Nederlando. Ĝi okazis kunlabore kun UNESKO kun titolo:

"Esperanto ĉe la instruistoj kaj en la lernejoj" pri i.a. la principoj de instruista organizaĵo, la loko de Esperanto en lernejoj, apliko de E. en ekzamenoj de infanoj por pli altaj lernejoj, la sinteno de instruistaj fak-asocioj al E., la diversspecaj "Someraĵ lernejoj", "Lernejaĵ kooperativoj", "Presarto en la lernejo", "Infana vortaro" (komparo de listo en "Sub la verda standardo" kaj 500-vorta listo de angla instruisto).

Laŭ la jarlibro de UEA, la oficiala informilo "La Juna Vivo" havas rubrikon kun oficialaj sciigoj kaj pedagogiaj raportoj kaj artikoloj. 1952: GEE (Franca Instruista Sekcio) komencis dufoje en jaro (dec., majo) eldoni specialan n-ron de *Esperanto et Culture* kun sekcio por ILEI. ILEI-kunveno en Oslo (37a UK) rezultigis planon por korespondado, "lernejaĵ familioj Esperantistaj" dank'al f-ino Tegg, anglino, kiu konsentis peradi la petojn. 3 aŭ 4 lernejoj formu familion kaj interŝanĝu regule ĉiu kun la aliaj 2 aŭ 3 en diversaj landoj. Du metodoj: 1. nur la instruisto scias E-on, sendas kun klarigoj en E. diversajn interesarojn, ekz. bildojn, desegnaĵojn, presitaĵojn, kartojn. 2. La lernantoj mem uzas Esperanton, deziras sendi personaĵajn leterojn. En la kongreso de '52 la Unua Sekcio daŭrigis la diskuton pri instrumentodoj. La ILEI-estraro ekhavis vic-prezidanton: J. Dedieu. Laŭ la jarlibro ILEI nun akceptis ankaŭ individuajn subtenantojn, lasante al siaj membraj societoj, kiuj

formas la komitaton, mem aranĝi la financan subtenon al ILEI: ekzistis 7 tiaj: Britujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Nederlando kaj Svedujo, krome 18 reprezentantoj. "La Juna Vivo" malaperis, provizore oni uzis la britan "Instruistan Bultenon". ILEI havas kontakton kun UNESKO, de kiu diversaj dokumentoj atingis f-inon Dedieu, ILEI-perantino. Oni anoncis eldonon de simpligita teksto de la deklario pri Homaj Rajtoj por uzado en lernejoj. Fine, 13.10.1952, UNESKO agnoskis la Ligon kiel internacian organizaĵon neregistritan, kun kiu UNESKO havas regulan interŝanĝon de informoj pri aferoj komune interesaj. En la decembra *Esperanto et Culture* aperis plena raporto pri la kunveno en Oslo (temo: "Puno en la lernejo"), kaj teksto de la eksperimento pri la instruado de la franca kaj Esperanto en la temaro de angla duagrada popollernejo.

1953: ILEI estis unufoje oficiale invitita al kunveno de nova, grava Mondfederacio de Organizaĵoj de la Instruista Profesio (31.7.-4.53) en Oxford, same en postaj jaroj.

En la UK (Zagreb) la publika kunveno traktis: "Kiel la hejmo influas la lernejon? Ĉu gepatroj asocioj havas utilon?"

Kiel nova landa sekcio aliĝis "Aŭstraj E-Instruistoj". Oni aparte planadis interŝanĝon de lernejanaj korespondaĵoj ktp. kaj disvastigon de E. en edukaj rondoj; okazis gravaj kursoj por instruistoj en Grésillon kaj Hey's Farm (Britujo, "someraj lernejo").

1954: En la UK (Hago) temis i.a. pri la nederlanda leĝo en kiu la instruado de E. estas permesita. Granda eldonejo en Tokio subtenas E-eldonon de infanrakontoj: instigas la instruistojn sendi al la tuta mondo infanrakontojn.

F-ino V.C. Nixon kolektis novajn membrojn por povi reeldoni IPR.

En la jarlibro la celoj de ILEI tekstas nove: (I, p. 67): La ligo celas per E. internacian kolegaron mondscale, kiu ebligas pli larĝan pedagogian kulturon kaj plivastigos la instruadon de E. en lernejoj. (La ligo laboras per landaj membraj asocioj kaj reprezentantoj.)

3 praktikaj servoj:

- 1) koresponda por lernejoj (klase/individue, starigo de lernejaj familioj, korespondado inter geinstruistoj aŭ lernejanaj).
- 2) Servo por seminarioj por kunligi estontajn geinstruistojn.
- 3) Pedagogia Informilo en dec. kaj majo, sekcio de *Esperanto et Culture*.

En la kongresa rezolucio de la UK (Hago) staris i.a. "UN solvu la lingvan problemon ...", rekomandante ankaŭ al la Statoj-Membroj progresigi ĝian E-instruadon. Efektive la UNESKO-Rezolucio de 10. de dec. '54 enhavis: "La Statoj-Membroj regule informados la Ĝen. Dir. (pri E.-instruado).

Tial en '55 s-ro David Kennedy petis ĉiujn kompetentajn kiuj pretas instrui Esperanton informilojn. En la UK prez. Nixon donis superrigardon pri organizo kaj disvastiĝo de ILEI-asocioj en la diversaj landoj. Oni diskutis konduktliniojn por vekti la atenton de lernejaj instancoj pri Esperanto; organizadon de lokaj asocioj kaj la plej efikajn metodojn por la E-instruado laŭ la aĝo kaj la kulturpreparado de komencantoj.

La Centra Informejo en Birmingham respondis multajn informpetojn, donis konsilojn pri instrumentadoj, lernolibroj. La koresponda servo estis malmulte uzata.

1955: UNESKO sendis altvaloran materialon por la kongrestemo en Bologna: "Inf. Eduko kaj ĝia Pacema Rolo". Rezultoj aperis en *Esperanto et Culture* kaj en la bulteno de la Societo de britaj E-istaj Instruistoj.

1956: La UK-sekcio pri E. en lernejoj publikigis la provizoran rezulton de enketo pri E-instruado: en 147 lernejoj en 23 landoj al 4-ĝis 5000 lernantoj. Krome jam evidentiĝis, ke Esperanto helpas precipe la lernadon de geografio kaj al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj.

ILEI diskutis pri internacia ekzamena komisiono, decidita en Bologna (UK '55). F-ino Dedieu enkondukis diskuton pri "La organizo kaj valoro por lernejanaj de ferioj en aliaj landoj". Oni krome diskutis aranĝon de infan-kunveno en Grésillon.

1957: La unua sekcio de la UK "Esperanto en la Edukado" aŭdis leteron de s-ro Malmgren: "Lernado de E. kiel helpilo por plifacila lernado de fremdaj lingvoj". S-ro Erbetta (Svislando) raportis pri "Grajnoj en Vento", aperinta en 25 ekzempleroj, inter por 20 klasoj el diversaj landoj. S-ro Albault sendis raportojn pri ebloj kaj efikoj de internacia kontakto inter edukistoj, kun mencio de "Universala legolibro"; la raporto substrekis la gravan rolon de ILEI kaj valoron de kontaktoj kun aliaj internaciaj instruistaj organizaĵoj.

ILEI-komitato decidis plu eldoni "Instruistan leteron", sed krom sendi komunikadojn de sia Centra Oficejo al "Int. Pedagogia Revuo", aperonta en '58 6 kalendarojn po 16 paĝoj. UK-temoj de ILEI: La laboro de nacia instruista E-asocio; taskoj farendaj, indaj, kaj fareblaj. Limoj de la profesiaj devoj de instruisto. En la jarlibro '57 aldoniĝis al la celaro: pritrakti pedagogiajn temojn en kaj per E. kaj favore influu edukajn instancojn.

La komitatanoj elektas estraron el siaj membroj. Laŭ Jarlibro '58: ekde '57 ILEI akceptas individuajn membrojn, kie ne estas membro-asocio per simpla abono al la oficiala organo. ILEI (4a en la listo): ĝis junio '56: 7 membroj-asocioj, el kiu la franca havas 824 membrojn: ILEI havas 1380 membrojn. Venis informoj pri 1687 geinstruistoj en 21 landoj. Interrilatoj sukcesis kun Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Estonujo, Hungarujo, Nov-Zelando, Polujo. Aliĝis Aŭstralio (kun 12 membroj).

En la jarkonferenco en Kopenhago oni diskutis pri: "Ferioj por lernejanaj kaj gejunuloj en aliaj landoj: organizado kaj valoro".

La komitato akceptis rezolucion, subtenantan la proponon ĉe Konsilantaro de Eŭropo: eksperimente instrui Esperanton dum 1 jaro en po unu klaso, en po unu lernejo en 5 eŭropaj landoj.

Krom *Instruista Letero*, kies dua serio aperis, ekzistis propraj organoj en Aŭstralio, Aŭstrujo, Britujo, Francujo kaj la germana lando Hessen.

1958: Okazis la UK seminario de Andreo Cseh: partoprenis 130 personoj. La Komitato de ILEI decidis i.a. disvastigi la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj, laŭ propono de E-instruistoj preni responson pri "Geonkloj Esperantistaj" (skemo por helpi junajn E-istojn per kunligado koresponda kun plenaĝuloj. Diskuto pri "Instruistaj ferioj - ĉu tro longaj? - Ĉu oportunaj laŭ datoj? - Kiel uzataj kaj uzotaj?" kaj "Kiel la instruistoj agu por enkonduki E-on?" Laŭ propono de la jugoslavia reprezentanto rezolucio tekstis: "Ĉirkaŭ 180 geinstruistoj el 13 landoj kunvenintaj en Mainz alvokas siajn E-istajn kolegojn en la tuta mondo uzi E-on por propraj lernejaj interŝanĝoj ĉiuspecaj, kaj proponi peresperantan helpon al ne-esperantistaj unuopaj kolegoj kaj instruist-asocioj por ties internaciaj rilatoj."

En '58 la jarlibro menciis membroj-asociojn de ILEI en naŭ landoj (nova estis Nederlando: krom 13 reprezentantoj (Alĝerio, Belujo, Dan., Finn., Hisp., Israelo, Jug., Maroko, Norv., Svis., Urugv.). Inter la komitatanoj do aperis ekstereŭropanoj: S-ro Suzuki Kiyosi. Laŭ la enketo de s-ro David Kennedy venis informoj pri 1803 geinstruistoj en 30 landoj. E. estis instruata efektive en (minimume) 88 lernejoj en naŭ landoj, ĉefe Jugoalvio kaj Britujo. SBET (la angla asocio) eldonis lernejan vortaron anglan E-an. La *Int. Pedagogia Revuo*, sekcio de *Esperanto et Culture* aperis kiel aparta eldonaĵo, sesfoje jare.

ILEI estis reprezentita ĉe la kongreso de WCOTP (Mondfederacio de Organizoj de la Instruista Profesio) per observanto Francesco Fresco, kaj en la 2a amerika kongreso de blinduloj. Okazis interŝanĝoj de informiloj kun tutmonda instruista organizaĵo FISE.

1959: Dum la Varsovia Kongreso ILEI diskutis kiel la asocio pli bone funkcii. Roma Thorsen raportis pri deviga E-instruado en kombino kun geografio, 2 horojn semajne por 10-11-jaraj lernantoj en Kopenhago. Oni preparolis pedagogiajn seminariojn okazontajn en '60 en Francujo kaj Jugoslavio. Aldoniĝis laŭ jarlibro '59 membroj-as. en Finn., Jugosl. kaj

Svisujo: sumiĝis eŭropaj landoj plus Japanujo kaj Aŭstralio; 286 membroj-abonantoj plus 1 609 membroj en la 9 landoj-membroj. Konkluda frazo en la jarlibro: “Pli kaj pli necesas starigi instrukondiĉojn, laŭ internaciaj spertoj, por Esperanto konforme al tiuj por aliaj lingvoj.

Aperadis *Instruista Letero* (9x), *Graĵnoj en Vento*, *Gepatra Bulteno*, *IPR*, (de franca GEE: kiel tutmonda forumo de ILEI).

1960: La jarlibro mencias novan organon de ILEI: Edukado Internacia. Aliĝis membroj-asocioj Bulgarujo, Nederlando, Pollando. Oni sciis pri almenaŭ 2 504 E-geinstruistoj en 14 landoj.

77 “Geonkloj” korespondis kun 105 “Genevoj” en 21 landoj.

Ankaŭ en la UK de 1960 (Bruselo) la Unua Sekcio okupiĝis pri “Esperanto en la lernejoj”.

Ĝi 1) aŭdis kun aprobo la raportojn pri la nuna stato de E. en la lernejoj kaj pri la klopodoj, vastigi la instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejoj, 2) rekomendas al UEA daŭrigi la kampanjon *Esperanto kiel Baza Lingvo* kaj intensigi la klopodojn por Subskribo de Interŝtata Konvencio laŭ decido de la komitato de la 15-a de dec. '59, prenante en konsideron, laŭ la eblecoj kaj cirkonstancoj, la sugestojn entenitajn en la raporto de la Internacia Pedagogia Semajno en Bohiny kaj en la raportoj de la landaj komisionoj de diversaj landoj.

Cetere la revuo *Esperanto* informis pri kongresa kunveno de ILEI: Rilate al kunlaboro kun UEA oni prenis pozitivan sintenon, sed oni atentigis, ke *ILEI estas sendependa esperantista organizo*. En Harrogate (UK '61) oni dediĉis 3 kunvenojn al “heredo” de certa monsumo de la iama Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj.

Alia temo estis: Edukado kaj Edukatoj. Ĉu la lernejoj ĝuas la nuntempan vivon laŭ via eduka sistemo aŭ ĉu ĝi estas nur *sperto necesa*? Enkonduke s-ino Kennedy prelegis “kiel interesi la gelnantojn en la lecionoj”: pri enkonduko de modernaj instrusistemoj. Laŭ franca enketo (raportis f-ino Dedieu) la lernantoj deziras tian modernan instruadon kaj pli da libero.

1961: 14 membroj-asocioj, laŭ nekompletaj ciferoj estis 1 233 instruistoj en 12 landoj. E. estis instruata al 4 472 lernejoj en 9 landoj kaj al 1 675 seminarianoj en 3 landoj. En la maja numero de Edukado Internacia aperis historio de Esperanto en Britaj Lernejoj '48 - '58. 103 geonkloj korespondis kun 164 genevoj en 27 landoj (ĉefe Britujo, Ĉeĥoslovakujo). En la UK 24 komisiitoj el 11 landoj por la Lerneja Kampanjo kunvenis sub prezido de ĝia gvidanto d-ro I. Lapenna. Pruviĝis, ke nur du landoj estas pretaj por la int. konvencio: Pollando kaj Jugoslavio. Aliajn tri volis serĉi inter Brazilo, Danl., Finn., Isl., Nov-Zel., Sved.

Reprezentanto de la pola registaro vizitis la respondecajn aŭtoritatojn en popoldemokratioj. Oni rekomendis, ke li vizitu ankaŭ la menciitajn landojn. En Jugoslavio oni preparos renkontiĝon de infanoj “infanoj ne konas limojn” kaj paralele konferencon de instruistoj, nur el lernejoj, kie E. estas instruata: ĉio sub la aŭspicio de la jugoslavia “UNESKO-komisiono. La intenco estis, ke la koncernaj landaj UNESKO-komisionoj raportu al UNESKO. ILEI aperis en la adresaro de Instruistaj Asocioj, kompilita de UNESKO.

1962: 2 641 instruistoj. E. estis instruata al 9 593 gelnantoj en 457 lernejoj kaj 7 seminarioj en 15 landoj. ILEI kunlaboras kun Koresponda Servo Mondskala. Geonkloj korespondis kun 184 genevoj en 23 landoj.

Ĉe IFTA s-ro Malmgren reprezentas ILEI. ILEI decidis, laŭeble plenumi la duan laborplanon de UEA (i.a. kontaktoj kun internaciaj fakaj organizaĵoj ne-esperantistaj). Oni elektis f-inon Nixon honora prezidanto. Post ŝia morto ('63) ŝiajn postskribaĵojn tradudis f-ino Whetley por ILEI. Novaj sekretario: s-ro Svantesson, kasisto: s-ino Leijder.

1963: La 48a UK esprimis en sia rezolucio apogon al la rezolucio kiun

rekomendis al ĝi la Int. Konferenco de Lernejoj. Labordivido: La UEA-komisiono pri Lernejoj zorgu-laŭ decido de la UEA-komitato- pri la kontaktoj kun diversaj aŭtoritatoj, ILEI zorgu ĉefe pri metodiko, lerniloj kaj edukado de novaj instruistoj. Cetere la komisiono pri lernejoj aprobis projekton de interkonsento inter la lernejoj en kiu E. estas instruata: ili pli intime kunlaboros inter si kaj kun la respondeculoj de la Lerneja Kampanjo; ĝi akceptis ankaŭ alvokon al la monda instruistaro (por pozitiva sinteno al Esperanto), akceptitan de la Beograda Konferenco (plus ties 6-punktan rezolucion al UEA: kunvoko de estontaj lernejoj konferencoj kiel konstanta forumo, kreo de administra centro por la lerneja agado ktp. ILEI mem decidis kompili liston de legolibroj kaj lernolibroj. Vic-sekretario fariĝis s-ro Olle Olssen (Sved.). Salutis la Bulgara Ministro de Popola Edukado, kaj la Asocio de Bulgaraj Instruistoj kaj Internacia Federacio de Sindikatoj-instruistoj. Temo: “Rimedo por profesia kapabligo de instruistoj antaŭ kaj dum la kariero”. Oni ankaŭ renkontiĝis kun la ministro de Pop. Edukado, kiu prelegis pri la instrua sistemo en Bulgarujo: Aldoniĝis 15a lando: Svisujo.

1964: Laŭ unua Labora Sekcio de la UK, sub prezido de d-ro Lapenna, aŭdis tre ampleksan raporton de s-ro Markarian: “La eduka valoro de Esperanto en lernejoj”, laŭ respondo la CED-enketo: pri facileco kompare al naciaj lingvoj, rolo kiel baza lingvo por lernado de aliaj lingvoj, kuraĝiga efiko (pro la baldaŭa aplikado) helpo al aliaj lernobjektoj (geografio). CED ricevis komision instigi pliajn eksperimentojn pri paralela lernado de Esperanto kaj fremdaj lingvoj en lernejoj.

Aliĝis 16a sekcio al ILEI: la dana.

En la Haga UK s-ro A. Korff prelegis por ILEI pri “La leĝaj eblecoj por E. en Nederlando, pri prove akceptita leĝo pri oficiala instruado, aliaj prelegoj: studo de fremdaj lingvoj en Nederlando; instrumentoj, mekanikaj helpiloj; la lerneja sistemo en Sovet-Unio.

1965: 2a Int. Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata estis planota en Bishop's Stortford (Britujo), tamen prokrastita al '66 (en Graz).

1966: La dua I.K.L. bone sukcesis, sub aŭspicio de la Aŭstria Nacia Komisiono por UNESKO. 145 profesoroj kaj instruistoj el 20 landoj partoprenis; renkontiĝis 60 infanoj kaj 20 junuloj-lernantoj. La temo: “La Asociigintaj lernejoj de UNESKO kaj la rolo de Internacia Lingvo”. La kongrestemo en Budapeŝto de ILEI: pri modernaj metodoj de fremdlingva instruado. Oni finredaktis la statuton, fondis Instituton de Pedagogio kaj Didaktiko. La Oficiala Organo de ILEI: Edukado Internacia: restas kiel internacia informilo, redaktoro: Oskar Sventesson. La Interlerneja Interkonsento ampleksis kiel antaŭe 120 lernejojn. Oficialigo de Esperanto disvastiĝis en Brazilo. En '65 Polujo la unuan fojon en pedagogia lernejo oni donis poentojn por E- diplomoj por estontaj instruistoj. Same en Usono okazis instruista E-kurso en kiu la poentoj influos la salajron. Du regionaj instancoj en Britujo aranĝis ekzamenon pri E. por mezgradaj lernejoj. En la UEA-Konsulta Komisiono pri Lernejo aliĝis por la rilatoj kun ILEI-prezidantino f-ino Dedieu. Prezidanto de KKL: I. Lapenna (ĝeneralaĵoj, rilatoj kun instruistaj organizaĵoj): Toczyski (anstataŭ tro okupita Malmgren) kiel vicprezidanto pri ĉiuj lernejoj demandoj: Markarian: pri pedagogiaj demandoj, Zlatnar: organizaj demandoj.

1967: Prezidanto de KKL fariĝis s-ro J. Toczyski. La sekretario de ILEI, d-ro Dazzini, iniciatis en Italujo la agadon por la leĝo (kies projekto atingis la parlamenton sub n-ro 1816) pri instruado de Esperanto en la lernejoj laŭ la samaj rajtoj kiujn posedas aliaj fremdaj lingvoj. Al la celaro de ILEI aldoniĝis: ... kaj eduki geinstruistojn kaj gelnantojn je sento de internacia solidareco kaj reciprokaj estimo, interfratiĝo kaj interhelpado.

1968: Estis plano organizi Trian Konferencon de Lernejoj en kiuj E. estas instruata antaŭ la kongreso en Madrido, tamen prokrasto necesis ĝis antaŭ la UK de '69 en Helsinki. Respondis la demandaron de KKL ĝis 15 aprilo nur 18 personoj el 9 landoj (en '67 40 el 20 landoj) pri oficialigo de E-instruado. En Italujo la projekto 1816 estis akceptita en marto '68 en la ĉambro de Deputitoj. En Polujo projekto de programo por E-instruado en ĉiuj lernejoj kiel nedeviga instru-objekto estis aprobita per dekreto. Kalifornio ŝanĝis la leĝon favore al E. En Maribor, Jugoslavio 23 reprezentantoj el Aŭstrujo, Bulgarujo, Italujo, Jugoslavio, Hungarujo partoprenis la duan regionan Konferencon por Enkonduko de E. en Lernejojn.

Nova estraro de ILEI estis elektita (Madrido): prezidanto: s-ro R. Markarian (Britujo), vicprezidanto: s-ro H. Sonnabend (Germanujo), ĝenerala sekretario: d-ro M. Dazzini (Italujo), kasistino: s-ino D. Andersson, vicsekretario: s-ro G. Turin (Francujo).

Grava ILEI-konferenco okazis de 20.9.--29.9.1968 en Internacia Domo Sonnenberg (Germanujo). Partoprenis pli ol 80 geinstruistoj el 16 landoj. La kadrotemo estis: Fundamentaj Homaj Rajtoj kaj Liberecoj. D-ro Lapenna prelegis pri: La homaj rajtoj kaj la lingva problemo en la mondo; Ĉu interkompreniĝado inter la popoloj eblas nur per tiel nomataj ĉeflingvoj; La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj kaj ĝia enkorpiĝo en la juro de nacioj. S-ro G. Becker: La rolo de UEA en internacia rilatoj. D-ro W. Bormann: Liberalismo kaj dirigismo en rilatoj al la Homaj Rajtoj; La ekonomia evoluo kaj la Homaj Rajtoj. S-ro G. Dimov: Lingvo-instruado kaj edukado por Esperanto; Modernaj metodoj de Esperanto. D-ro P. Neergaard: Lernejoj Problemoj en la evolulandoj. D-ro V. Sadler: Lingvaj baroj al literaturaj interŝanĝoj inter la popoloj.

1969: S-ro Helmut Sonnabend anstataŭis f-inon Jeanne Dedieu kiel reprezentanto de ILEI en Konsulta Komisiono pri Lernejoj. La membroj de KKL interkontaktis ofte i.a. en la CED-Oficejo en Londono. S-ro Sonnabend ekprizorgis la statistikon en la nomo de CED-ILEI. Pro ferioj en la sudaj landoj la rezultoj (14 936 infanoj lernis E. en 28 landoj) estis ne kompletaj. Prof. Lapenna enketadis pri katedroj kaj lektoratoj. Prosperoj en Belgujo (broŝuro de d-ro Denoël: *L'E. dans l'enseignement*), Aŭstrujo (dekreto pri instruebleco de E. kun instruplano) kaj Litova SSR (oni instruas E-on), UE-on reprezentis s-ro Pimpalkhare en FIOCES (int. def. de org. por lernejoj korespondado k. interŝanĝoj), fine de dec. '68 konferenco en Bombajo (Hindujo). Komisiono akceptis rezolucion rekomendantan E-on por korespondado.

La prokrastita Tria Pedagogia Konferenco okazis post la UK-Helsinki. Temis pri la demando, ĉu interŝtata konvencio pri oficialigo de Esperanto en certaj landoj nun havas perspektivon. Generale pliboniĝis la cirkonstancoj, sed la decida preteco ankoraŭ mankis. Oni decidis energie plusekvi la celon kaj tiurilata rezolucio estis farita.

1970: Antaŭ la UK en Vieno okazis en Maribor asemblea konferenco de ILEI. Partoprenis pli ol 130 gekolegoj. La asembleo konfirmis la en Madrido elektitan estraron de ILEI. Plue decidis la konferenco pri la definitiva statuto. Feriaj centroj por Esperanto-parolantaj infanoj estis unu el pluraj temoj. Oni varme rekomendis centrojn en Grésillon, Montpellier, Primošten, Rijeka (Jug.), Szeged kaj Balatonszemes (Hung.). Ĉefa temo estis: La internacia jaro de edukado surbaze de la Internacia Lingvo Esperanto. Enkondukis H. Sonnabend.

1971: Komitatkunsido okazis dum la UK en Londono. Oni diskutis kurantaj aferojn, aŭskultis la staton de lerneja eksperimento por instruistoj en regiono II. La bulgara sekcio sukcesis organizi kurson en Burgas (Nigra Maro). ILEI transprenis la aŭspicion. Plue la komitato decidis regule ĉiujaran organizi ILEI-konferencon. Oni decidis pri Budapeŝto kaj komisiis la hungaran sekcion transpreni la organizadon.

1972: La konferenco okazis kombine kun la Hungara Festivalo. Du gravaj dokumentoj estis antaŭmetitaj kaj deciditaj. La unua dokumento temas pri "Internacia Pedagogia Ekzameno de ILEI". Ĝi celas: internacie altigi kaj unuecigi la nivelon de lerneja instruado de Internacia Lingvo de Esperanto; atesti surbaze de konforma ekzameno la kapablon instrui Esperanton je ĉiuj lernejoj ŝtupoj, partopreni pedagogian didaktikan esplorlaboron kaj sciencan agadon. La dua dokumento temas pri "Scienc-Esplora Instituto de ILEI (SEI).

1973: Okazis asemblea konferenco en Maribor antaŭ la UK en Beogrado. La delegitoj elektis novan estraron: prezidanto: Helmut Sonnabend; vicprezidanto: Johano Inguŝ; ĝenerala sekretario: Mario Dazzini; kasisto: Olle Olsson; vicsekretario: Gaston Turin.

La asembleo donis nian organizon finan strukturon: ILEI dividiĝas en zonoj, regionoj kaj sekcioj. La organoj de ILEI estas: asembleo, komitato, estraro, kontrola komisiono, scienca esplorinstituto, Internacia Ekzameno kaj Internacia Pedagogia Revuo.

Plue oni decidis pri 10-jara perspektiva plano:

- 1.) la lerneja evoluo
- 2.) klerigado de instruistoj
- 3.) instrudemandoj.

En Beogrado informis ILEI la publikon pri la laboro de ILEI. Montriĝis kreskanta interesiĝo pri niaj labormetodoj.

1974: vidu la raporton pri la konferenco en Sonnenberg. ILEI aliĝis al UEA kiel aliĝinta faka organizaĵo en julio kaj eksiĝis en aŭgusto. Vidu la deklaron de la prezidanto!

Tio estas tre mallonge la historio de ILEI kaj entute ne kompleta. IPR intencas kompletigi nian historion iom post iom. La redakcio atendas viajn kontribuojn.

ILEI konsistas nun el 28 landaj sekcioj kaj 5 kunlaborantaj organizoj.

ILEI-Konferenco en Internacia Domo Sonnenberg

de la 17a ĝis la 26a - 7 - 1974

De d-ro Mario Dazzini, Italujo; Hugo Röllinger, Germanujo
(esperantigis la germanan tekston)

La konferencon partoprenis 47 instruistoj el 16 landoj. Detale la Konferenco diskutis diversajn aspektojn de modelaj formoj pri instruado de Esperanto en la lernejoj. Jam la enkonduka parolado de prof. d-ro Frank pri la temo: "Edukteknologiaj aspektoj de internacia lingvo-politiko", emfazis la ĝeneralajn konsiderojn kiomgrade Esperanto, kiel planlingvo, influas korelativie la lernadon de aliaj fremdlingvoj.

Direktoro J. Inguŝ, Hungarujo, raportis pri ekzistantaj spertoj kaj rezultatoj de la ĵus finitaj lernejoj modelaj eksperimentoj en 4 landoj (Bulgarujo, Italujo, Jugoslavio, Hungarujo).

Post enkonduka parolado fare de Rektoro Helmut Sonnabend, laborgrupoj okupiĝis pri la problemoj, kiuj lingvaj grupoj estu formotaj por ke modelaj eksperimentoj povu esti konstruivaj.

D-ro Peter Zlatnar, Jugoslavio, parolis pri sciencaj kaj praktikaj demandoj kiuj devus validi ankaŭ por ĉiuj internaciaj lernejoj Esperanto-eksperimentoj.

Rektoro Sonnabend raportis pri aspektoj de instruado de fremdaj lingvoj jam en la unuaj elementaj klasoj rilate Esperanton. Li akcentis, ke estas grave difini klaran koncepton pri la atingendaj instruceloj.

D-ro Kasselmann montris eblecojn kaj limojn en apliko de komputeroj; tamen evidentiĝis, ke pere de komputeroj estas eblaj variaj analizoj.

D-ro Mario Dazzini, Italujo, esploris kiaj eblecoj povus rezultiĝi pere de Esperanto en la lernejoj por la infanoj de gastlaboristoj; ĉirilate li citis ankaŭ la novan laborplanon de Unesko en kiu ankoraŭ ĉiam la lingva problemo restas nesolvita.

Fine de la konferenco en pluraj laborgrupoj estis analizitaj la rezultatoj de la diversaj kontribuoj kaj diskutoj. Rekomendoj kaj konkludoj fariĝis decidaj por la 29 sekcioj rilate pluajn modelajn instruformojn.

Esenca perspektivo por nia Ligo estas la profesia klerigo de instruistoj. Niaj instruistoj estas preparataj kaj ekzamenataj laŭ unuecaj vidpunktoj. Ekzamenoj por instruistoj estas aranĝataj fare de internaciaj komisionoj. La kvalito de la ekzamenoj konformas al la normoj de ŝtataj altlernejoj. En la vesperaj horoj la partoprenintoj de la konferenco estis instruataj pri la postulo de la ekzamenoj.

Labormetodoj:

- 1) Prelegoj: ili utilis al la enkonduko kaj prezentis la taskojn
- 2) Grupaj diskutoj, ĝeneralaj diskutoj
- 3) Studado de la problemoj en la laborgrupoj

Detalaj raportoj:

1. Prof. d-ro Helmar Frank, universitato Paderborn: Klerigeteknologiaj aspektoj de internacia lingva politiko.

La demando pri lingva politiko estas ponto inter profesia kaj politika agado. Ni bezonas vojon al internacia lingva interkompreniĝo. Miaj tezoj pri germana lingva politiko estas aplikeblaj por ĉiuj lingvoj: ne estas dezirinde rezigni je germana lingva politiko. Tiu lerneja politiko estas maljusta kiu metas la anglan lingvon en la unuan vicon. La sekvo: en internaciaj konferencoj oni rezignas je apliko de la germana lingvo.

Ni strebas al Unuiĝinta Eŭropo, do sekve ne estas eble lerni 7 lingvojn. La egalrajteco postulas enkonduki neŭtralan lingvon ĝenerale deviga. Do ni bezonas ankaŭ lingvo-politikon eŭropan. Laŭ vidpunkto de Eŭropo argumentoj por planlingvo estas tre gravaj. Oni preferu parolu pri la nocio "Planlingvo" ol pri "Esperanto".

Oni devas riproĉi al la politikistoj ke de ili ne venas pozitivaj kontribuoj, ili lasas ŝvebi la aferon.

Ĉu tio koincidas kun la politika percepto?

Kio estas maldekstre, kio dekstre? Kion signifas "mezo"; "maldekstre de la mezo"? ktp.

Laŭ linia ordo ne estas eble.

Klasifiko:

- A – maldekstre: jura egaleco-egaleco-kolektivismo
- B – dekstre: stabileco -firma ordo -konservativismo
- C – meze: libereco – liberalismo

En triangulo: ĉiu el ĉi tiuj grupoj dividiĝas en du partoj. En tiun ĉi skemon estas enordigenda ne nur la lingva politiko sed ankaŭ ŝtatoj: konservativaj, liberalaj aŭ kolektivaj.

Ne havas sencon diri: Esperanto sur la tablon kaj ĉiuj estas konvinkitaj. Al kiuj argumentoj el tiuj ĉi tri ni povus esti konfrontataj?

A. Egaleco de la ŝancoj: Abituriento ricevas 1 500 lecionojn de instruado en angla lingvo. Rezultato de esploro: nur 7% povas partopreni diskutadojn kun samaj ŝancoj. Estiĝas nova elito. Anoj de kolektivismo ne volas elito-grupon. Jen argumento por planlingvo.

B. Konservativismo: Lernado de angla kaj franca lingvoj konsumas la tempon antaŭviditan por la lernado de germana lingvo. Jen argumento por planlingvo.

C. Liberalismo: estas postulata pli da tempo por liberaj agoj. La instru-programon oni devas malampleksigi. Angla lingvo celas nur al la angla regiono: limigo de la klera horizonto.

Planlingvo-Esperanto: tempo-bezono 200 lernhoroj. Ĝi ofertas konsiderindan ŝparon da tempo. Du jaroj por Esperanto egalvaloras 5 jarojn por la angla lingvo.

Plue en la raporto estis traktitaj klerigeteknologiaj aspektoj. Baze de la 4 ŝtupoj de pedagogia laboro (Instrumaterialo, instruceloj, stato de la elementaj konoj, medioj) Frank parolis pri klerigeteknologiaj rimedoj: objektivigo de la ekzamenoj (apliko de ekzamenaj aŭtomatoj), konoj pri planlingvoj estas facile ekzameneblaj; objektivigita instruado (apliko de teknikaj programitaj instru-sistemoj; sistemoj pri didaktprogramigo; instruplanado). En ĉiuj medioj de instruado de planlingvo – jen Esperanto – estas garantiite optimala atingo de la instrucelo pere de klerigeteknologia pedagogio ĉe minimuma tempo-bezono.

2. Direktoro Johano Ingusz, Hungarujo:

Spertoj pri rezultatoj de la "Kvinlanda eksperimento" pro enkonduko de Esperanto en lernejojn.

La 26an de marto 1967 en Maribor estis fondita Konstanta Internacia Konferenco inter la landoj Aŭstrujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Italujo kaj Hungarujo, kiu programis koncentrigi kaj koordini ĉiujn taŭgajn agojn por la akcelado de la instruado de E. en la membro-ŝtatoj.

La decida 3a konferenco, kiun partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la koncernaj edukinstancoj, okazis la 27.3.1970. Oni decidis aranĝi trijaran eksperimenton de instruado de Esperanto al difinita nombro de lernejoj en la membro-landoj.

La celoj estis:

- 1 – Esperanto estas taŭga por ke la instruado de gepatra lingvo fariĝu pli klara;
- 2 – Esperanto estas taŭga plirapidigi postan instruadon de fremdlingvoj;
- 3 – Esperanto helpas al plibona kompreno de normalaj internaciaj nocioj;
- 4 – Esperanto fariĝas perilo en kulturaj medioj kaj kondukas al variaj amikaj kontaktoj.

La sciancan gvidadon surpronis prof. d-ro Istvan Szerdahelyi de la Universitato de Budapeŝto.

Ĉiu partoprenanta lando taskigis fakulojn kiuj estis respondecaj rekte al la Scienca Centro.

Estis je dispono detale ellaborita didakta koncepto. Efektive partoprenis la modelan eksperimenton 26 klasoj kun entute 625 lernantoj. Lingvoj: bulgara, hungara, itala, kroata, serba kaj slovena. Dum la lerneja eksperimento okazis entute 8 konferencoj por certigi la unuecon de la eksperimento. La oka konferenco decidis eldoni ĝis la 1.3.1975 dupartan dokumentaron por la publiko:

- 1 – Priskribo pri la laboro de la internacia konferenco;
- 2 – Scienca analizo de la lerneja eksperimento.

La fino de la lerneja eksperimento okazis en la formo de "Internacia lernejo" en Primosten, junio-julio 1974. Partoprenis 85 gelernantoj kun 16 instruistoj. Estis la celo montri, ke la infanoj disponis pri sufiĉe da lingva scio por sekvi multflankan instruadon en internaciaj grupoj kaj por uzi ankaŭ

inter si nur Esperanton. Jam nun oni povas konstati, ke la celoj de la eduka eksperimento estis atingitaj.

Diskutado:

Dum la diskutado la lerneja eksperimento estis juĝita pozitive, oni proponis ke la instruado en la modelklasoj devus esti laŭplane daŭrigata. La rezultato de la scienca esploro laŭdecide estu prezentata al ĉiuj edukaj administracioj. Pluaj edukaj eksperimentoj okazu en aliaj landoj.

3. Rektoro Helmut Sonnabend, Federacia Respubliko Germanujo: Lingvaj, landaj grupiĝoj por edukaj eksperimentoj pri Esperanto.

La tasko estis:

Kiuj lingvaj aŭ landaj grupiĝoj estu formitaj por edukaj eksperimentoj pri Esperanto:

a) ĉu nur grupiĝoj aŭ landoj?

b) ĉu nur grupiĝoj aŭ lingvoj?

c) ĉu miksitaj grupiĝoj?

Rilate a) estis faritaj la sekvantaj proponoj:

Grupo: Grekujo, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Finnlando, Svedujo, Norvegujo, Danlando, Islando.

Grupo: Germanujo, Belgujo, Britujo, Francujo, Hispanujo, Nederlando, Svislando, Luksemburgio.

Grupo: Sovet-Unio, Koreujo, Japanujo, Nov-Zelando.

Rilate b) proponoj:

Grupo: germana, rumana kaj ugro-finna lingvoj.

Grupo: germana, slava kaj turka lingvoj.

Rilate c) proponoj:

Nederlando, Belgujo, Britujo, Francujo, Hispanujo, Germanujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Islando, Danlando, Pollando, Rumanujo, Ĉeĥoslovakio, Grekujo, Sovet-Unio.

La proponoj estu konsiderataj kiel studoj. Ĝenerale oni esprimis, ke rilate lerneja eksperimento estu tamen dezirinda la reciproka geografia proksimeco, eĉ se ankaŭ eksperimento inter du geografie ekstremaj landoj povus esti tre konstruiva.

Kiel proksimaj celoj estas proponitaj:

Esperanto-eksperimentoj en Danlando, Svedujo, Finnlando, Sovet-Unio, Pollando, Demokrata Respubliko Germanujo.

Eksperimentoj en Francujo, Belgujo, Nederlando, Britujo, Federacia Respubliko Germanujo.

Pro la multlingveco en Svislando estas proponita propra eksperimento.

4. D-ro Peter Zlatnar, Jugoslavio:

Sciencaj kaj praktikaj problemoj en kunligo kun edukaj eksperimentoj.

Principaro:

- 1 – Elirpunkto por ĉiu planita eduka eksperimento estu la diferencaj lingvoj de la partoprenantaj landoj;
- 2 – La celo por ĉiu eduka eksperimento ĉiam estu demonstri, ke Esperanto estas taŭga komunikilo inter diversaj landoj;
- 3 – Estas necese krei adekvatan organizaĵon, konstrui informservon kaj prepari respektive la instruistojn. Necasaj estas kontaktoj kun oficialaj instancoj;
- 4 – Internacia lingvo-Esperanto estu ofertata egalrajte kiel elekta lingvo inter aliaj fremdlingvoj. Ĝi estu laŭorda instruobjekto;
- 5 – Interŝtata konvencio certigu la instruadon de Esperanto;
- 6 – Pro tio la organizaĵoj de Esperanto-instruistoj devas perfekte kunlabori;

- 7 – Ĉiu eduka eksperimento devas havi sciencan akompanion;
- 8 – La eduka eksperimento devas esti planita en ĉiuj detaloj kaj ĝia strategio devas esti primeditata;
- 9 – La internaciaj kontaktoj atingeblaj pere de Esperanto devas esti enkondukitaj jam dum la eduka eksperimento;
- 10 – La socipolitika funkciado de Esperanto devas esti pluevoluita ankaŭ post eduka eksperimento.

Dum la diskutado:

Direktoro, ne-esperantisto, de itala lernejo, en kiu estas instruata Esperanto kiel unua lingvo por ĉiuj infanoj, konstatis ke la infanoj lernas sian gepatran lingvon pli bone kaj lernas duan fremdlingvon pli rapide kaj ke ili evidentiĝas pli grandan komprenon por problemoj de aliaj popoloj.

La situacio por plua lerneja Esperanto-eksperimento nun estas favora en Francujo, Belgujo, Nederlando, Britujo kaj Germanujo. Unesko laŭplane estu informita pri ĉiuj planoj kaj laboroj de ILEI kaj estu petata pri subteno.

5. Rektoro Helmut Sonnabend, Federacia Respubliko Germanujo: Esperanto-Instruado en elementa lernejo, ĝia motivigo kaj Instrucelo.

Resumo:

Principe oni meditas en la pedagogiaj diskutadoj ĉu fremdlingva instruado jam komenciĝu en la elementa lernejo. Pluraj lernejoj eksperimentoj pere de la angla lingvo montras, ke instruado jam en la unuaj elementaj klasoj estas favora pro la lernpsikologiaj kondiĉoj; oni rajtas konkludi, ke la eksperimenta stadio estas finita kaj ke oni povas proponi la ĝeneralan enkondukon de la angla.

Laŭ aliaj konsideroj oni ne plu instruu la anglan kiel “britan-anglan” aŭ “usonan-anglan”, sed doni al la angla minimume en Okcidenta Eŭropo, la karakteron de internacia lingvo, kiu estu lernata de ĉiuj infanoj jam en la elementa lernejo ankaŭ kiel baza lingvo. Pluraj fremdlingvoj povas esti lernataj poste, eventuale nur kiel “pasiva lingvo”.

Alternative ni proponas Esperanton kiel unuan fremdlingvon en la elementa lernejo, ĉar ĝi prezentas kiel unua lernita lingvo pli bonajn kondiĉojn ol la angla, kiu kiel unua fremdlingvo estas relative al aliaj lingvoj tro periferia, dum Esperanto formas la lingvan mezon.

Fakdidaktike Esperanto estas instruebla kaj lernebla pli ekonomie kaj racie, la lernantoj do lernas pli intensive. Ol mezuroj do rezultiĝos, ke rilate lernadon de Esperanto, estas bezonata ĉirkaŭ nur 1/5 de la tempo necesa por la angla.

La gramatikaj formoj en Esperanto estas lerneblaj komplete kaj estas regataj. Pro la klara semantiko de la vortradikoj ĉiuj devenoj estas kapteblaj laŭsence. La lernanto post la lernado kapablas paroli la lingvon produktive kaj aktive. La apliko de la lingvo kondukas al lingva ekzakteco.

Pedagogie didaktikaj eksperimentoj rilate lingve socialan malfavorigon pruvos, ke Esperanto povas egaligi kompanse kaj do fariĝas efika ankaŭ emancipiĝe.

Socialdidaktike Esperanto alportos la decidan kontribuon al la internacia edukado, alivorte, kontribuon al eduko pri toleremo, estimo, kompreno kaj amikeco inter homoj de aliaj popoloj.

Principe oni difinu 3 tipojn de eksperimentoj

1) *Longdaŭra formo:* maksimuma daŭro ĝis 2 jaroj. Ĝi celas al la didaktika priskribo de la lerneja eksperimento.

2) *Mezlongdaŭra formo:* ĉi-kaze estas planataj sinsekvaj eksperimentoj ĝis la daŭro de 4 semajnoj. Ili reprezentas aldonajn rimedojn al la ĉefa eksperimento kaj kondukas al intertempaj respondoj, kiuj povas esti signifoplenaj ankaŭ por la fakgazetaro.

3) *Mallonga formo*: tempodaŭro ĝis 1 semajno. Ĝi servas la samajn celojn kiel citite en 2). Eksperimentoj en mallonga formo povas esti aranĝataj ankaŭ en klasoj, kiuj ne apartenas senpere al modeleksperimento sed en kiuj povas esti testata la reago pri difinitaj problemoj.

Diskutado:

La konferenco diskutis tre detale pri la didaktikaj faktoj kaj sugestis rekomendi al la instruinstancoj modelajn eksperimentojn en la elementaj lernejoj depost 1975 en la regiono II (Francujo, Belgujo, Nederlando, Britujo, Federacia Respubliko Germanujo).

6. D-ro Hans Kasselmann, ĝenerala altlernejo Paderborn:

Testanalizoj per komputero.

Resumo:

D-ro Kasselmann enkondukis en la laborsistemon de komputero, informante pri ties eblecoj kaj limigoj. Estas tute eble, evoluigi krom test-programojn ankaŭ instruprogramojn; ĉi-lastaj povas esti ofertataj kiel intensivaj kursoj al universitatoj.

Testprogramoj estas formulendaj tiamaniere, ke devas esti redonataj respondoj en komputeraĵoj; ĉi-tiukaze eblas plej ampleksa utiligo en multaj kategorioj. D-ro Kasselmann estas preta, transpreni la sciencajn testadon pere de komputero.

Diskutado:

Oni eluzu la eblecojn de la aplikado de la komputeroj por modeleksperimentoj pere de Esperanto; sed la testmaterialo devus esti unuecigata internacie, por akiri pli precizajn ĝenerale validajn rezultatojn.

Resumo kaj rezolucio:

Instruistoj, membroj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) el 16 landoj (Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Britujo, Italujo, Jugoslavio, Kanado, Kolombio, Nederlando, Svedujo, Hungarujo, Usono kaj Federacia Respubliko Germanujo) kunvenis de la 17a ĝis la 26a de julio 1974 en Internacia Domo Sonnenberg por partopreni la laborkunsidojn, kies ĉeftemo estis: **Aspektoj de modelaj eksperimentoj koncerne Esperanton.**

Ili prikonsideris la diversajn aspektojn jene:

1.1 *Lernejaj eksperimentoj*

1.2 *Regiono I*: en la regiono I al kiu apartenas Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio, estis finita trijara lerneja eksperimento kun partopreno de difinita nombro da lernejoj (26). Internacia somera lernejo, aranĝita en Primošteno (Jugoslavio) de la 25a junio ĝis la 3a julio 1974, liveris la praktikan ateston pri la atingitaj rezultatoj en la uzado de internacia lingvo - Esperanto. La lernejan eksperimenton gvidis la Eötvös Llorand Universitato en Budapeŝto, kiu publikigis la rezultatojn kaj prijuĝojn en ĉi-rilataj dokumentoj.

1.3 *Regiono II*: La konferenco decidis daŭrigi, en kunlaboro kun Unesko, la lernejajn eksperimentojn en pluraj regionoj kaj atendas de politikaj edukinstancoj, ke ili konfrontu al ĉi tiu tasko kaj ke ili disponigu teknikajn kaj financajn rimedojn.

Por 1975 estas proponita la aranĝo de dujara lerneja Esperanto-eksperimento kiel unua fremdlingvo en elementaj lernejoj inter la landoj Belgujo, Federacia Respubliko Germanujo, Francujo, Britujo kaj Nederlando. La sciencajn subtenon laŭpropone transprenu la universitato Paderborn.

2.1 *Esperanto kiel perilo por komputeroj.*

La konferenco konstatis, ke la lingva problemo en la Komunumo de 17 landoj ne estas solvita, kvankam multaj fremdaj lingvoj estas instruataj en la lernejoj de eŭropaj landoj.

La konferenco decidis koordini la laboron en ĉi-tiu medio, kun la celo al pli bona kunlaboro kun oficialaj instancoj, por tiel ebligi ke povos esti instruata la Internacia Lingvo Esperanto en la lernejoj kaj ke ĝi trovu respektivan aplikon en specifaj fakoj (Temoj pri Eŭropa kunlaborado).

4.1 Rilatoj al ICEM (*Institut Coopératif de l'Ecole Moderne* - Frenet-Movado)

La Konferenco decidis, intensigi la rilatojn inter ambaŭ organizaĵoj tiel ke la membroj de ILEI estu informitaj pri la ĉiujaraj aranĝoj de ICEM kun la celo ke la ILEI-anoj partoprenu.

5.1 *Mankantaj kontaktoj kun internaciaj sindikatoj.* Ekde nun internaciaj fakorganizaĵoj estu informitaj pri celoj kaj labormetodoj de ILEI.

6.1 *Unesko.* La Konferenco dum ĝia laborado ankaŭ studis la Unesko-dokumenton 18 C/4 - *Dix-huitième session, Paris 1974 - Conférence générale - (Analyse des planifications à moyen terme - 1977-1982)* kaj konstatis, ke tre multaj temoj en ĝi koincidas kun tiuj de nia organizaĵo. Baze de la Rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de Unesko en 1954, la Konferenco decidis, ke la landaj sekcioj de ILEI estu petataj pristudi profunde ĉi-tiun gravan dokumenton, ke ili preparu programon por la ĉi-rilata laborado en la landaj sekcioj kaj ke ili raportu pri tio al Unesko-komisionoj de la diversaj landoj.

6.2 *"La situacio de la gastlaboristoj ŝajnas esti solvita teorie ankaŭ en lingva rilato, sed la realo estas tre malkuraĝiga"* (Unesko). Tial ILEI do proponas sian aktivan kunlaboron en la preparo kaj realigo de konkretaj solvoj kaj atendas ĉi-rilate inviton fare de la Ĝenerala Sekretario de Unesko.

6.3 La Konferenco esprimas specialan deziron, ke la Ĝenerala Sekretario kaj la naciaj Unesko-komisionoj kaj morale kaj finance subtenu la iniciatojn de ILEI kiuj helpas solvi la lingvan problemon en la senco de Unesko-Dokumento 18 C/4.

La lerneja aplikado de Esperanto-instruado

De Helmut Sonnabend, Germanujo (FRG)

1 La didaktika loko de la aplikado

Ĉiu instruisto kaj precipe la Esperanto-instruisto ĉiam demonstros sian instruarton. Ne kontraŭante lian naturan pedagogian talenton, tamen mi pretendas, ke li pedagogisience kapablas enordigi - metodike/didaktike - ĉiujn siajn paŝojn. (Pro tio tiu ĉi verketo ne estas intencata kiel receptaro - ilin oni trovas en kuirlibroj - sed kiel logike konceptita parteto de ampleksa instrumentado.)

Do, la aplikado de Esperanto ne estu ia akcesoraĵo, sed tute preciza didaktikaĵo de la instruado. Jena skizo demonstros la lokon de la aplikado:

a	b	c	ĉ
motivacio	prezentado	labora fazo	aplikado

Speciale la aplikado ludas rolon en Esperanto-fako. Ties neatendo en la fremdlingva instruado kondukas la lernanton al tiu kompleksa anima stato

ĝenerale nomata seninteresiĝo. Ofte konstatebla estas nur la pseŭda aplikado en la klaso mem. Ekzemple ludante magazenon, la lernantoj, uzante la koncernan lingvon, nun "aplikas" ĝin. Per tio la instruisto iom por kelka tempo vigligas la tristan, klasan atmosferon. Mi ne intencas malvalidigi tiajn laŭdindajn farojn, sed ili apartenas al formoj de ekzercado sed ne al aplikado. Tro ofte limiĝas la leciono al nur du fazoj: prezentado kaj labora fazo. La Esperanto-instruisto nepre evitu tian instruadon, se li volas teni, konservi, eĉ pliiĝi la lernfavoron de siaj ĝelernantoj. Por tiom da malsukcesoj en la fremdlingva instruado ne ĉiam kulpas la netalementeco kaj maldiligenteco de la infanoj aŭ la komplika instrumaterialo, sed ili minimume samofte produktiĝas el la nekompetenteco de la instruisto, kiu ne sufiĉe studis sian metion. La aplikado – ĉiam parto de ĉiu leciono (ne studhoru) – apartenas al la sinpreparado de la instruisto. Emfaze denove estu dirite, ke Esperanto-aplikado nepre okazu en internacia medio – ekde la unua leciono.

2 Formoj de eksterklasa aktiveco kaj aplikado

1 *Kvin principoj por la instruisto*

- 1-e) Aplikado kaj aktiveco estu parto de la instruplano.
- 2-e) Antaŭ ol vi intencas komenci la instruadon, kontaktu kun gekolegaj alilandaj por komune ellabori planon de aplikado kaj ĝelernanta aktiveco, t.e. kadroplanon.
- 3-e) Komune kun la ĝelernantoj, strikte sekvante la lingvan progreson, starigu konkretan agadprogramon rilatantan vian instruoplanon.
- 4-e) Ĉiu aplikado kaj aktiveco ne estu kontrolata de vi, sed strikte observata.
- 5-e) Propagandu publike (instruista kolegio, gazetaro, gepatroj, ktp.) regule sed nur konkretajn rezultojn.

2 *La tri bazaj formoj de la aplikado*

Ekzistas tri formoj de la aplikado kaj aktiveco – konkretiĝantaj sur tri ebenaĵoj:

1. klasa
2. grupa
3. individua

Ĉiu el tiuj karakteriziĝas per difinaj trajtoj kaj esencoj kaj devas esti ope priskribita. Ĉiu formo ĉiam celu la plenan internaciigon de Esperanto. Tio estu via objektiva celo, ĉar ĝia plenumo nur kondiĉas viajn aliajn gravajn celojn:

1. eduki viajn infanojn al internacieco
2. vekti komprenemon pri la vivmaniero de infanoj en eksterlando
3. eduki viajn infanojn estimi aliajn rasojn kaj religiojn
4. eduki ilin toleri alies opinion
5. vekti la senton, ke la homoj estas samrajtaj
6. konsciigi la infanojn, ke ĉiuj homoj portas komunan sorton
7. vekti intereson por la problemoj de la aliaj
8. konvinki la infanojn, ke necesas komuna agado por venki mizeron, malsaton, malsanon kaj katastrofojn en la mondo
9. eduki la infanojn al solidareco
10. laborigi ilin por la paco.

21 *Klasa aplikado kiel ĝenerale kolektiva*

En tiu formo partoprenas la tuta klaso. Ni nomu ĝin kolektiva.

La distingiloj de tiu kolektiva laboro estas jenaj:

- 1-e) Starigitaj estas nur jenaj taskoj por kies solvoj estas bezonata la kunlaboro de ĉiuj ĝelernantoj apartenantaj al la klaso.
- 2-e) Ĉiuj ĝelernantoj respondecas la plenumon de la taskoj.

3-e) Ĉiu lernanto havas la rajton libere esprimi sian opinion pri faritaj postuloj kaj povas mem fari ilin (demokrata principo).

22 *Grupa aplikado kiel specife kolektiva*

Evidentiĝas, ke la kolektiva aplikado kaj aktiveco estas la preferinda formo. Jam la edukaj valoroj estas pli altaj, ĉar la ĝelernantoj pli bone lernas enordiĝi en la socian sistemon de sia popolo.

La grupa formo distingiĝas de la klasa per tio, ke ĝi prezentiĝas en aro da personoj, kiujn io komuna kunigas. Tiu io estas specialaj intereso, kiuj estas komunaj por parto de la ĝelernantoj. Tial nek la nombro nek la membroj de la diversaj grupoj estas fiksitaj, ĉar la lernanto devas havi la rajton kunagi ne nur en unu grupo. Tamen zorgu la instruisto, ke la grupoj laŭ nombroj ne estu tro grandaj. Pli ol ses lernantoj po unu grupo ne estas rekomendinda.

23 *Individua aplikado kiel amike kaj intime persona, privata*

Tiu ĉi aplikado altgrade dependas de la lingvokono de opa lernanto, pro tio la tempopunkton destinu la instruisto. Ĉar nepre la privata sfero de ĉiu estu savata kaj respektata, principe la instruisto ne havas la rajton, enmiksi sin en la individuecon de siaj ĝelernantoj. En tiu ĉi formo de aplikado serĉas la lernanto amikajn rilatojn al alia individuo ĝis nun ne konata kaj fremda al li. Lia unua letero respondita en la sama lingvo aplikata de li, konsciigas lin pri la unika valoro de Esperanto. Kaj tiaj personaj interrilatoj efikigas jenan enanimiĝon, kiu transformas individuan amikecon minimume en simpation por la popolo de sia nova amiko. La instruisto nur helpu, sugestu kaj kuraĝigu.

3 La organizado de klasaj aktivecoj

La organizado de klasaj aktivecoj okazu en jena sinsekvo:

1. Grupiĝo de kunagadpretaj klasoj
2. Ellaborado de komuna agadprogramo
3. Aktualigo de la programo en la klaso kaj aldonoj.

al 1: Evidentiĝas por la klasa aktiveco, ke ĝi bezonas agadkampon, kaj laŭ la karaktero de Esperanto ĝis devas esti internacia. Do, ĉiu klaso bezonas partneron, minimume unu. Pli efikaj kaj por la ĝenerala publiko multe pli okulfrapaj estas pluraj interklasaj lernejoj kontaktoj. Pro tio mi rekomendas, ke unu klaso kontaktu kun po unu klaso el ĉiu lando partoprenanta la eksperimenton.

Rilate la realigon leviĝas malfaciloj, nome ekestas la demando, kiamaniere la klasoj trovas la kontaktojn. Prezentiĝas tri eblecoj:

1. La instruisto alskribas klasojn troviĝantajn sur la adresa listo de la PED - materialo.
2. Fondiĝas centro pri lerneja aplikado, kiu peras la klasojn.
3. Kunordiga PED - konferenco en kunveno komune starigas planon pri grupiĝo.

Avantaĝo de la unua ebleco estas, ke instruisto kaj ĝelernantoj propracie povas serĉi la partneron, sed malavantaĝo estas la neekonomia tempoperdo, ĉar antaŭe ne estas certe, ĉu la aliaj klasoj jam havas sufiĉe da kontaktoj. La dua apliko estas pli bona. La ĉefa kondiĉo estus unu glate funkcia centro, kiu tuj reagis. Ĝeneralaj spertoj pravigas pridubojn. La plej taŭga solvo estas la tria ebleco. La kunordiga PED - konferenco povas detale trakti ĉiujn demandojn, diskuti la problemojn kaj finfine sankcii devigan organizan planon.

al 2: La tiel aŭ tiel fondita agadgrupo – ni nomu ĝin: internacia agad-rondo pri lerneja aplikado kaj aktiveco (mi riskas mallongigon: IALA) – ellaboru kadroplanon, kiu prezentiĝu per kelkaj ĉefaj trajtoj antaŭviditaj agadpunktoj, tamen allasantaj sufiĉe da propraj iniciatoj en la unuopaj klasoj. Nepre atentinda estas la tempa limigo de la komuna agadprogra-

mo je kvarona jaro. Ĝia rekonsidero kaj profundigo unualinie dependas de la lingva progreso.

al 3: Unue nur post certigo de kontakteblecoj la instruisto havas la rajton informi siajn gelernantojn, ĉar estus plej malbone antaŭe promesi ion, kio poste ne estas farebla. Ĉio nun konkretiĝu en planado de agad-programo (principo). Konsiderante la kadroplanon gelernantoj kaj instruisto detaligu ĝin laŭ lokaj eblecoj tipigantaj la ecaron kaj karakteron de la propra lando.

31 Ĝemelaj klasoj

La "ĝemelaj klasoj" estu la unua paŝo al internaciaj kontaktoj. Ne estas konsilinde jam komence disvolvi la aplikadon en plurajn direktojn, ĉar pro manka lingvokono, mankaj spertoj en internaciaj kontaktoj kaj ne sufiĉa rego de necesaj teknikoj la instruisto tre multe devas helpi. Kiam ni ankaŭ poste plivastigas la aplikadan kampon, tamen restu la ĝemelaj klasoj la bazo. Ĝi permesas pli intimajn kontaktojn, allasas pli profundajn aktivecojn. Pro tio estas rekomendinde, ke la ĝemelklaso troviĝas en najbara lando, ĉar tiam personaj renkontiĝoj pli facile eblas.

32 Pliigo de klasoj

Antaŭ ol ne pasis duona jaro de lernado la instruisto ne pliigu la klasojn por pluaj kontaktoj. Kvazaŭ forlasante la varman neston, la gelernantoj nun ekspertas pli vastan kadron de la internacieco. Jen plenumiĝu ankaŭ la postulo de nia ILEI-statuto:

paragrafo 2/e:

daŭre aranĝi la plej diversajn aranĝojn internaciajn por la infanoj, por ke ili apliku la Internacian Lingvon;

paragrafo 2/f:

eduki la infanojn al internacia interkompreniĝo.

4 Prezento de la klaso per fotoj kaj biografioj

La unua kontakto estas tre grava, ĉar ĝi decidas pri la daŭro kaj intenseco de ĉiuj sekvantaj kontaktoj. Ju pli zorgeme ĝi estas preparita, des pli efika estos la reciproka preteco fidele teni la interrilatojn. Pro tio simpla letero pri kontaktoferto ne estas tiel taŭga kiel ekzemple prezento de fotoj kaj aliaj detalaĵoj.

En la ĉapitro pri motivacio mi emfazis, plejeble ĉiam eluzi konkretajn situaciojn, plue la korelativcon inter motivacio kaj aplikado. Nun ĝi estas.

La unua studhoru estu dediĉita al ĝenerala motivacio. La antaŭpreparo estu jena: La instruisto elpoŝigu kolorafrankitan leteron, ricevitan de kolego de estonta ĝemela klaso (ambaŭ instruistoj reciproke sendu ĝin), sciigu la enhavon esperantlingve. Certe post sufiĉa admirado de la poŝtmarko la gelernantoj volas sciigi pri la enhavo, kiun la instruisto nun kompreneble tradukas.

La enhavo estu proksimume jena: Mi intencas instrui Esperanton, kaj mia demando estas, ĉu ankaŭ vi intencas la saman. Se jes, niaj ambaŭ klasoj povus komune lerni kaj tiel kontaktigi unu la alian. Tiamaniere ni povus eluzi la eblecojn, kiuj prezentiĝas per Esperanto. Certe nun ekestos konversacio pri la lingvo mem. Lerta gvidado fare de la instruisto konduku al jenaj decidoj:

1. jes, ni volas kontakti kun ili, kaj

2. jes, ni volas lerni Esperanton.

Ebla daŭriga konversacio:

I.: Bone, ni lernu, tamen antaŭe ni devas respondi. Sed kiamaniere?

Nur mi? Tio ne estus tiel efika. Mi proponas, ke ĉiu el vi persone prezentu sin. Tiam la alilandaj lernantoj iomete pli bone havos imagon de vi.

L.: Ni ankoraŭ ne regas Esperanton.

I.: Tio momente ne gravas. Ekzistas ankaŭ alia internacia lingvo. Mi pensas pri fotoj pri vi. La necesajn indikojn ni lernos dum la venontaj studhoroj.

Post detala instrukonversacio rezultiĝas jena plano:

Por la kvina studhoru ĉiu lernanto kunportu

1. belegan foton de si (plej novan, ne suĉinfanan) – pasporta dimensio –
2. ne uzitan poŝtkarton
3. gluaĵon.

Lerneja grupo komisiita prizorgu ilustritan karton pri la loko, en kiu troviĝas la lernejo, alia grupo kunportu mapon pri la koncerna regiono, kaj la tuta klaso decidu pri malgranda donaco.

La instruisto preparu foton pri la lernejo kaj pri sia klaso, kompreneble kun siaj gelernantoj. Li skribu la akompanan leteron komune skizitan. Uzante la kvinan studhoron la klaso komune kun la instruisto nun kunmetu la materialon. Pro praktikaj kaŭzoj oni gluu ĉiujn preparitajn poŝtkartojn sur memfaritan faldfolion, ĉar tiel ili ne perdiĝos, kaj oni bone povas kroĉi ilin sur la muron de la klasĉambro. La poŝtkartoj ricevu ekzemple jenan aspekton:

foto

Mi estas Dieter Müller

Mi naskiĝis la 15an de marto 1960.

Mia hobbio: futbalo

Mia adreso:

.

Kaj nun la klaso atendu la respondon.

41 Interŝanĝoj de protokoloj pri lernitaj instruobjektoj

Protokolo en lerneja senco estas tiu skriba formo, per kiu komisiita lernanto raportas aŭ konstatas, kion la klaso faris, kion la instruisto instruis, kion li vidis, aŭskultis kaj finfine komprenis. Tia raporto ĝenerale estas utila, ĉar ĝi respegulas la faritan laboron kaj ĉiam permesas relegi faktojn por asocii ilin kun novaj. Krome la devigo signifas protokoli instruhorojn taŭgan stilekzercon, plue bonegan rimedon kontroli la komprenon de instruerzultoj.

Turniĝante al nia speciala intenco, ni ekkonas la valoron de interŝanĝoj de protokoloj. La gelernantoj sciigas tiamaniere pri kio iliaj novaj geamikoj lerneje okupiĝas. Ofte la transsenditaj protokoloj malfermas novajn perspektivojn, tiel ekzemple, ke ĝia enhavo instigas la gelernantojn demandi aŭ diskuti pri temoj protokole prezentitaj.

Taŭgaj aspektas al mi jenaj instruobjektoj pro ilia ĝeneraleco:

historio: ĉiu pedagogo scias, ke niaj historiaj lernolibroj ofte ne rilatas al historia vereco.

geografio: valora laŭ du direktoj: La gelernantoj povas interŝanĝi geografiajn rezultojn de la propra lando, kaj kompari akiritan scion pri geografiaĵoj de por ambaŭ fremdaj landoj.
matematiko: bonega kampo por interkonigi la samajn problemojn.
biologio: eblecoj, interŝanĝi kolektitajn lokspezificajn plantojn premit-forme.

fremdlingva

instruado: tute aparta formo por la aplikado de Esperanto. Ĝi servu kiel ilo por peri konsilojn pri lingvaj demandoj. Ekzemple unu ĝemela klaso estas franca, la dua angla. Ili reciproke povas lerni la lingvon de la alia: angloj la francan, francoj la anglan. Ege interese, kiam la francaj amikoj korektos la lingvoscion de angla instruisto pri franca lingvo kaj ankaŭ inverse.

Tiu ĉi aplikado ekestu proksimume post tri monatoj. Mi premias je tiu tempopunkto scion pri la prononco de Esperanto, ekkonon de fraza strukturo, kaj la kapablon uzi vortaron, krome ili konas (do, ne scias) la ortografion. La interŝanĝo de protokoloj periodigu monate. Komune kun siaj gelernantoj la instruistoj elserĉu celkonvena(j)n protokolo(j)n – kaj longtempe – li mem devas traduki. Tamen dekomence li laborigu siajn lernantojn, taskigante ilin, uzi la vortaron por nomi kelkajn terminojn koncernantajn la protokolon. Aldonitaj ilustraĵoj taŭgege helpas.

42 *Fotoraportoj pri diversaj vivsituaĵoj de la klaso kaj lernejo*

Fotoj, bildoj kaj desegnaĵoj ofte pli bone reproduktas vivsituaĵojn ol multaj vortoj. En nia aparta situacio fotoj helpas pli klare konigi la vivon en la klaso kaj lernejo.

Por la lingva aplikado de Esperanto jam tre frue estas bona ŝanco, ĉar por klarigi fotojn sufiĉas simplaj vortoj, simplaj frazelementoj. La fotoj dividiĝu en du grupoj: fotoj de momentaj situacioj, fotoj laŭ motivoj.

Por la unua grupo (momentaj situacioj) prezentiĝas vasta kampo, ĉar la “fotoĉasisto” serĉas la nenormalan situacion, li embuskas siajn “viktimojn”: kies fingro estas en la nazo; jen knabo, kiu cerbumas pri io; jen knabino, kiu kombas sian hararon, jen la instruisto en aparta pozo; jen knaboj ĝue maĉantaj panon; jen infanoj ĉe solvo de malfacilaj taskoj; ktp.

Motivaj fotoj (dua grupo) prezentu plane vivsituaĵojn, do laŭ temoj.

Jen kelkaj proponoj:

- Nia klaso matematikas.
- Nia klaso Esperantas.
- Nia klaso geografias.
- Nia klaso historias.
- Nia klaso sportas.
- Vivo dum paŭzo.
- Niaj adoleskaj lerneĵanoj.
- Niaj plej malgrandaj infanoj.

Kelkaj psikologiaj temoj:

- La trankviluloj.
- La melankoliuloj.
- La pensemuloj.
- La “profesoroj”.
- La grandtemperamentuloj.
- La steletulinoj.

Kiel la foto servo estu organizata? Eble mi subtaksas la verajn eblecojn, kiam mi anticipe pretendas, ke ĉiam estas gelernantoj posedantaj fotoaparatojn aŭ minimume la lernejo povas disponigi ilin, aŭ gepatroj, aŭ parencoj pruntedonas. Ĉiuokaze la instruisto entreprenu ĉion, por eluzi tian eblecon de lingva aplikado. Filmoj por la fotoaparato devus pagi la

lerneja administracio. Fondota devas esti fotoraportista taĉmento, kaj ĉiam estu fotoaparato je la dispono. Ĝi – la taĉmento – zorgeme observu la vivon en la klaso kaj en la lernejo por ne preterpasi bonajn ŝancojn, sed ĉiam estu sur la fotoj infanoj de la “Esperanto-klaso”, ĉar ja temas pri interŝanĝoj inter ĝemelaj klasoj. Lingve aplikeblaj estas simplaj frazelementoj, nur vortoj (verboj, adjektivoj, ...), ofte interjekcioj, ekz.:

Mario, nia filozofo
La ĉarma Katina
Dimitr pensas
Ho ve, ni matematikas

Do, serĉe trafu la situacion! Same aplikeblaj estas ĵus lernitaj fraztipoj:

Ĉu Stefano estas bela knabo?
Ĉu la knabinoj estas ĉarmaj?
Ĉu Esperanto estas interesa?
Paŭzon – ĉu ankaŭ vi ŝatas?

Ĉiuj infanoj de la klaso kunhelpu sistemordigi la fotojn. Alia fako povas helpi (manlaboraĵo), la infanoj manelaboru albumojn. Dum desegna horo engluu teme la fotojn kaj apliku vian lingvan scion kiel ekzemplite. Akompana letero (instruisto helpu) kompletigu tiun ĉi belan aktivecon de la gelernantoj.

43 *Fotoraportoj pri klasaj ekskursoj*

Tiu ĉi aplikado kuŝas sur la sama ebena, tamen ĝi estas pli speciala. Ĝia valoro ebligas unu la alian konigi la propran hejmlandon. Simpla lingvoscio sufiĉas por kelkaj fotaj subskriboj.

Oni fotu ĉefe laŭ ekskursiva vojo spicita per pluraj surprizaj fotoj. Eblaj stacioj estas proponataj (celo: montara regiono):

- La ekveturo (la infanoj enaŭtobusigas).
- En la aŭtobuso.
- La “taĉmento” survoje.
- Peza grimrado sur monto.
- Piedbaniĝo en sovaĝa rivereto.
- Dum ripozado.
- Sur ĉirkaŭrigarda turo.
- En malnova kastelo.
- Ĉe la skribado de bildkartoj (simplajn frazojn oni skribu tiel:
Korajn salutojn de nia belega ekskurso).
- En revanta urbeto.
- Antaŭ belaj malnovaj domoj.
- Antaŭ monumento, preĝejo.
- Dum aventura ludo.
- Antaŭ belaspekta fono de iu pejzaĝo.

Do, oni klopodu bone impresi siajn novajn geamikojn. Hejmenveninte la infanoj verku belegan vojaĝimpresadon. Simplaj lingvaj frazoj aŭ frazelementoj klarigu la fotojn: granda ĝojo – en la aŭtobuso – ni marŝas – streĉa grimrado – ho, malvarmega akvo – ktp.

44 *Disponigu de specifa instrumaterialo*

Tiu ĉi agado estas tre taŭga kaj utila formo, ĉar ĝi efektive ebligas disponigi instrumaterialon, kiu kutime ne estas havebla. Tiel ekzemple mia klaso ricevis donace aŭstralian bumerangon, kiu servis kiel bonega instru-motivacio pri Aŭstralio. La avantaĝoj estas okulfrapaj, ĉar ili ebligas reciproke riĉigi kaj ekipi la studhorojn, kio alie ne ekzistus. Tiel la klaso ofte havas je sia dispono la plej novajn kaj modernajn rimedojn taŭgajn por ekigi la envion de aliaj lernejaj klasoj.

Se viaj gekolegoj ne estas absolute preterviduloj aŭ neglektuloj, ili rekonas la realecon de la Internacia Lingvo Esperanto.

Jen kelkaj eblaĵoj el la fakoj:

Geografio: vojaĝprospektoj, bildkartoj, mapoj, tabeloj pri ekonomia strukturo, desegnaĵoj el propra geografia dosiero, bildoj pri tipaj kulturitaĵoj: vinberkulturoj, fromaĝproduktivoj, minejoj, specialaj fabrikoj, industriaj entreprenoj (vidu 41), lumbildoj, modeloj.

Biologio: interŝanĝo de herbarioj, konservitaj papilioj kaj skaraboj, fruktoj de hejmaj arboj.

Historio: historiaj fotoj, bildoj pri la irado de historio, kopiitaj dokumentoj pri lokaj historiaj eventoj.

Statistikoj: Ĉiuspecaj tabeloj ofte bildigitaj en ĵurnaloj, ilustraĵoj, gazetoj.

Folkloraj: folkloraj vestitaj pupoj, ceramikaĵoj, malgrandaj pentraĵoj, ludiloj el hejma arto, popolkantoj surdiskigitaj

Esperanto: interŝanĝo de konvenaj legaĵoj, kantoj, poemoj.

Kiamaniere organizi la skizitan aplikaĵon? Szerdahelyi raportis iam pri ambasadora ludo. Ĉiu lerneja klaso el la internacia agadrondo eknomu el sia mezo "ambasadoron". Li transprenu la "diplomatan servon". Ĉefa tasko: inde kaj tre inde reprezenti brile sian landon. Ofte tien kaj reen iru la mesaĝoj esprimantaj apartajn petojn.

Povus eventuale ŝajni, ke tiu ĉi formo estas tro ampleksa. Sed ĝi ne estas. Ĝi ja ne signifas, ke ĉiu samtempe devas esti sendita. Nur la interkomunika valoro de Esperanto bonege evidentiĝas. Ĝi helpas plenumi modernan curriculum, tamen nur aplikebla de bezono al bezono.

La eksperimenta klaso atentigu la fakinstruistojn pri la eblecoj havigi deziritan instrumaterialon, aŭ pli bone ĝi surprizu ilin. La "ambasadoro" komisiu sian "sekretarion" (Esperanto-instruiston) skribi koncernenan petleteron.

45 *Interŝanĝoj de sonbendoj pri la klasa Esperanto-instruado*

Ĝi (la formo) estas perfekta rimedo de aplikado kaj aktiveco. Ĝi montras la staton de la lingva kono kaj scio, konigas la instrumanieron de la instruisto, ebligas apartajn demonstradojn kaj demandojn. Entute la lingvo mem estas en la klaso. Krome mi povas certigi al miaj gekolegoj, ke la atentemo de la gelernantoj neniam estas pli granda ol en tiu ĉi momento. Mirinda streĉo de ĉiuj, eĉ ne la inspektoro atingas pli grandan efikon ol turniĝanta sonbendo. —

Kompreneble la teknikaj kondiĉoj devas esti plenumitaj. Sen sonbenda aparato kaj koncernaj sonbendoj nenio estos farita. Tamen kie estas volo ankaŭ estas vojo. Kolegoj, kiuj bezonas konsilojn turniĝu al la aŭtoro de tiu ĉi kompendio. Nur se la lernejo posedas sonbendan aparaton, nepre ne peku kontraŭ gravan metodan eblecon. Pensu nur pri tio, ke viaj infanoj povas mem kontroli sian lingvan kapablon, plue per ĝi vi disponas pri kroma lingva medio.

Funkciigu nur vian aparaton kaj komencu vian lecionon. Psikologie vidite ankaŭ la kvalito de la instruado en la sama momento pliboniĝas. Poste la sonbendaj specialistoj (vidu 534!) prizorgu la plej bonan elekton.

46 *Sonbenda prezentado de popolkantoj*

Elementa esprimbezono estas la kanto. La kulturon de iu popolo mi persone mezuras laŭ ĝia kantartrezoro. Germana proverbo asertas: malbonaj homoj ne havas kantojn. Kaj la plej multo de niaj kantoj jam estas tradukitaj. Metodike devas esti dirite, ke la kantado de Esperanto-tradukitaj kantoj multe kaj esence helpas la lernadon. Do, kantu ofte kun viaj gelernantoj esperantlingve, surbendigu la kantojn kaj tuj sendu la sonbendon al ĝemela klaso. Nur pro prononcaj kaŭzoj aldonu ĉiam la tekston. Vi povas esti certa, baldaŭ oni kantos la kantojn de via popolo.

47 *Interŝanĝo de ekspozicia materialo*

Bonega rimedo de aplikado, aktiveco, demonstrado kaj propagando estas

la ekspozicio. Ĝi estas konsiderata por neesperantista publiko, kaj pro tio tre zorgeme antaŭpreparanda. Rekomendinda estas samtempa ekspozicio, aranĝita de ambaŭ ĝemelaj aŭ pluraj klasoj. Ja, pro publikaj efikaj kaŭzoj, sed ankaŭ pro psikologiaj konsideroj komunaj preparoj estas konsilindaj: ĉar ĉiuj bezonas materialon de la alia(j), oni mem sendas atendante kompenson.

Neeviteblaj estas malvastaj kontaktoj inter la instruistoj por detale priparoli ĉiujn punktojn de la ekspozicio. Ambaŭ (aŭ pluraj) devas solvi veran strategion: simpla kuŝigo de la ekspoziciaĵoj tablen pli malutilas ol utilas. Feran principon enkorigu: komunaj ekspozicioj inter klasoj neniam celu *rekte* Esperanton. Ekspozicienda ne estu Esperanto, sed nur ĝia lingvo-komunika eficienco. Miaopinie enmarteligu en la kapojn de la spektantoj, ke *per* Esperanto la ekspozicio estas aranĝita.

Ekspoziciu ne trivialaĵojn de alia lando, sed ties karakterizaĵojn, ĉar ili vekas interesigon ĉe viaj vizitantoj!

Jen kelkaj temoj proponitaj:

1. Ni infanoj.
2. Ni gejunuloj.
3. Homoj en nia urbo.
4. Homoj ĉe la laboro.
5. Nia bela hejmlando.
6. Niaj grandaj progresuloj. ktp.

Por ne miskomprenigi vin: ne ekspoziciu pri vi mem en propra lando, sed via partnero ekspoziciu vian kaj vi lian, — do, reciproke. Esperanto estas via peranto!

Mi resumas:

1. La klasoj interkonsentu pri la temo!
2. Ekspoziciu la materialon de la "ĝemela" klaso!
3. Fiksu la "kiam" de transdono!
4. Aldonu esperantlingvajn klarigojn!
5. Bone propagandu la ekspozicion, emfazu, ke ĝi ebligis per Esperanto!
6. Informu la gazetaron!
7. Invitu gravajn personojn!
8. Informu detale en viaj fakaj gazetoj!

48 *Komuna renkontiĝo en junulargastejo*

Ĝi fariĝu kulmina punkto en la rilatoj inter la ĝemelaj klasoj. Ĝis nun nur en skriba formo aplikante Esperanton, la infanoj povas fari la bazan spertadon, ke per Esperanto efektive ankaŭ parola interkompreniĝo eblas. Frapas ĉiujn observantojn se ili subite ekspertas, ke la lingva problemo povas esti komplete solvita.

La rektaj rilatoj inter la ĝemelaj klasoj inter la infanoj pli profunde intensigas komprenemon kaj amikecon. Ne aparte devas esti menciite, kiel enorma estas la ekzerca valoro. Nun niaj infanoj vere devas apliki Esperanton.

Kompreneble tio kondiĉas minimuman lingvokonon. Plej frue tia renkontiĝo okazu post unu jaro de la lingva instruado. La junulargastejo situu proksimume duondistance inter ambaŭ lernejoj lokoj, tute egale sur kies tereno. Tie transprenu la instruisto la rolon de la invitanto kaj organizanto. Taŭga estus ia ajn feria tempo, kiu estas komuna, tiel ke ne ekzistus malfaciloj pere de la lernejoj administracioj. La renkontiĝo daŭru minimume ok tagojn.

Zorgema planado jam estas la duona aranĝo. Ĉio estu pripensita de la komenco ĝis la fino, kaj ĝi (la komenco) ne estas la senpera kunveno. Necesas, ke la invitanta instruisto ne nur elektu la junulargastejon, li ankaŭ antaŭe vizitu ĝin. Li esploru la restadĉambrojn, la dormoĉambrojn, eĉ la litojn. Li ekzameni la ĉirkaŭaĵon, elektu ekskursajn celojn kaj vizitu ilin.

Li zorgu, ke la invitotaj gelernantoj estos asekurataj. Kion fari dum la renkontiĝo? Ne dum, sed antaŭe devas esti ĉio aranĝita. Tiu ĉi unua renkontiĝo estas tro grava por eble riski nur malglataĵojn. La aranĝanta instruisto konsultu siajn lernantojn por starigi infankonvenan programon, certe ili havos bonajn ideojn. Krome li eluzu la subvencianj eblojn antaŭviditajn de la ŝtato en la kadro por junularprizorgado.

49 *Interŝanĝoj de gelernantoj*

Jam rutiniĝas en pluraj eŭropaj landoj regule interŝanĝi gelernantojn. Kutime oni sekvas du celojn:

1. vekti pli da internacia komprenemo, kaj
2. plibonigi la lingvokonon.

Kiel ajn laŭdindaj tiaj oficialaj strebadoj estas, ili suferas sub la malavantaĝoj, ke nur tiuj povas ĝui tian gastlernantigon, kiuj jam elitiĝis. Do, la eblaj gelernantoj nepre devas viziti pli kvalitajn lernejojn kaj iliaj klasikajoj devas esti elstaraj.

Sekvante realan pli profundan popolklerigadon, strebante forigi la maljustecon de ŝancoj, jen ni Esperanto-instruistoj multe povus demonstri. Interalie:

1. ankaŭ ordinaraj popogelernantoj nun havas la saman ŝancon,
2. uzi la internacian principon de Esperanto ĉe samlingvanoj,
3. ke gastlernantoj lernantaj la lingvon de la gastlando eĉ loke per Esperanto ekspertas grandan helpon, kiu rilatas lingvajn demandojn.

La ĝeneralaj dekretoj pri interŝanĝoj de gelernantoj ankoraŭ ne konsideras Esperanton evidente pro tio, ke la dekretantoj ne havas ideon kien interŝanĝi. Inter Francujo kaj Germanujo jes, inter Britujo kaj Francujo, same jes. Per internacia kontrakto la interŝanĝo estas garantiita. Sed Esperanto?

Proprainciate ni devas solvi la problemon. Ni observu la feriajn tempojn inter niaj ĝemelaj klasoj. Ili ne ĉiam estas koincidaj. Kiam unu ĝemela klaso ferias kaj la alia ne, ĝi povas inviti gastlernantojn. Ili loĝu ĉe amikoj, kun kiuj ili jam bone amikiĝis.

Kelkaj principaj rimarkoj necesas:

1. La tuta klaso respondecu la gastojn, temas ja pri "oficiala" invito.
2. La gastlernantoj loĝas nur ĉe amikoj, kies familioj zorgas pri la korpa bonstato.
3. Oni invitu 3 ĝis 5 ĝemelajn klasanojn (grupa konekso).
4. La grupo partoprenu la instruadon (ebleco, eksperti alian lernejan medion).
5. Post la lecionoj estu riĉa programo por la grupo, jam antaŭe de la klaso planita.
6. Elspezoj estu komune pagataj.
7. Nepre informu la publikon pri la evento.

5 La organizado de grupaj aktivecoj laŭ specifaj intereso

Ju pli progresas la lingva scipovo de la infanoj, des pli pligrandiĝu aplikado kaj aktiveco. La nura kolektiveco de klasa agado nun disvolviĝu pli al individua aktiveco, kiu grupe organizite sekvu specifajn interesojn. Por sugesti siajn gelernantojn la instruisto prezentu liston kun tuta aro da ofertoj. Ofte infanoj ne scias pri siaj propraj intereso kaj inklinoj. El la listo la gelernantoj elektu por ili plaĉajn temojn, skribante ilin sur slipon. Kolektante kaj ordigante ilin (laŭ deziroj kaj nomoj), la instruisto ekvilibrigu la infannombrojn inter la grupoj. Pli ol ses infanoj por grupo ne estas rekomendindaj. Se grupoj jam estas sufiĉe frekventataj kuraĝigu hezitantajn infanojn, elektu aliajn temojn.

Tiaj grupaj laboroj apartenas al la instruplano, do periode estu enlaborigita: grupa laboro.

51 *Sporto*

Ĉiam estas infanoj, kiuj interesiĝas pri sporto, tamen nur ĝenerale. Ilia laboro estus, atenteme kolekti bonegajn fotojn de famaj sportuloj kun ties aŭtogramoj. Komune la grupo produktu albumon kaj engluu la fotojn provizitajn per esperantlingvaj klarigoj. Okaze de internaciaj konkursoj eble nur inter la landoj de ambaŭ ĝemelaj klasoj, la agadeblecoj povas esti tre efikplenaj. Reciproke la informservo rapidiĝu pli pri sportaj faktoj de la konkurantoj, pri ĝisnunaj sukcesoj, pri trejna stilo, personaj biografioj ktp.

511 *Futbalo*

Neniam mankas pri tiu ĉi kampo "specialistoj". Jen estas bonegaj eblecoj de aplikado kaj aktivecoj. Volonte la grupanoj interŝanĝas fotojn, biografiojn pri siaj famaj futbalistoj, la herooj de la nacio. Volonte ili alskribas ilin petante aŭtogramojn, samtempe menciante, ke ili estas konsiderataj por eksterlandaj amikoj. Oni povas reciproke prezenti la tabelojn pri la stato en la plej supera futbala klaso, aldonante la necesajn komentojn. Multaj diskutoj letere aŭ sonbende eblas. Raportoj pri propra futbala praktiko doniĝos. Bona ludo por la tuta jaro estas la intertotorondo, laŭ transdonotaj parigoj de teamoj la infanoj divenu la ĝustan rezultaton. Oni kolektu la poentojn, kaj post fino de la jarperiodo oni konstata la venkanton. Se ambaŭ instruistoj de la ĝemelaj klasoj sukcesus aranĝi futbalan matĉon, ili atingus pli por Esperanto ol per plua traktato.

512 *Skiado*

Ĉar la skiado floras nur en vintra tempo estas por interesiĝuloj dua ŝanco kunagi en alia grupo. La supraj sugestoj kompreneble validas ankaŭ por tiu ĉi kampo. Kulmina punkto povus esti komunaj skiferioj. La komuna antaŭpreparo estus fruktodona pro la apliko de Esperanto: prospektoj, kie, kiel, kiam, kiom da mono prezentus sufiĉe da temoj. Kaj la interparoloj internacilingve vespere en la kabano povus baze stimuli aliajn gastojn.

513 *Naĝado*

Ĝenerala aplikado kaj aktiveco v.s. Ĉar ankoraŭ ĉiam mankas difcilaj terminoj pri la diversaj sportaj subkampoj, oni povus lingvigi taŭgajn terminojn, kiel rompnaĝado, dorsnaĝado, brustnaĝado ktp. Somerumadoj ĉe marbordo, preparoj kaj kelkaj konkursoj estas bonvenaj aranĝoj.

514 *Tabloteniso*

Iam nur ping-pong-ludado ĝi metamorfoziĝis la serioza sportarto kun la aparta kapablo influu la altan politikon kiel montriĝis en Ĉinio, kiam usona teamo tablotenisistoj kun ĉina teamo. Certe al la grupo apartenas nur tiuj infanoj, kiuj ankaŭ aktivis sur tiu ĉi sporta kampo. Apud la kutimaj eblecoj apliki kaj aktivis estus tie ĉi speciala lingva tasko. Komisiite la grupo povus analizi ĉiujn movojn koncernantajn tablotenison por poste terminigi ilin. Komparinte kaj pliboniginte la novajn terminojn la grupo kreintus por si devigan bazon por sekvontaj diskutoj. Por pli intense vigligi la grupajn interrilatojn mi proponas jenan ludon, kiu nomiĝas: internacia matĉo imaga. Ĉiu partnera grupo dividiĝu en hungara kaj bulgara duongrupoj ekzemple. Ili ludas laŭ komuna plano, starigas tabelojn kaj notas la poentojn. Post fino de matĉaj ludoj kaj kalkulado de poentoj, oni sciigu la rezultatojn unu la alian kaj konstata la venkintan respektive venkitan landon. Tiaj oftaj kontaktoj garantiu vigan lingvan aplikadon.

- 515 *Atletiko*
 Atletiko estas tiu sportobranĉo, kiu dividiĝas en altosalto, kurado, diskoĵetado, lanĉoĵetado aŭ sportado per pezglobo, martelo kaj marŝo. La atletiko estas la plej malnova sportobranĉo, ja estis ĉe la grekoj la sola sola dum la olimpikado.
 Tiu ĉi sportado certe pro ĝia historia origineco ĉiam allogas geknabojn. Okupiĝo pri tiu ĉi temo de ambaŭ grupoj (poste pluraj!) fariĝos frukto-dona, ĉar tiel oftaj konkursoj okazas, tiel ke ili sufiĉe da agadtemoj liveras. Aparta laboro kaj tre valora estus verkado de atletiko-atlaso.
- 52 *Tekniko*
 Tuto de la metodoj kaj procedoj por plenumi verkon de arto, produkton de industrio aŭ faraĵon de metio. Mi tie ĉi nur celas teknikaĵojn senpere interesajn por la infanoj. Ĉi-loke mi mencias nur tri, lasante al la instruisto kaj klaso aldoni aliajn.
- 521 *Aŭtoj*
 Ĉu la lando mem produktas aŭtojn aŭ ne, aŭtoj ĉiam trovas la admiron de infanoj. Grupoj, en kies landoj oni mem produktas aŭtojn, regule povas informi pri aŭtotipoj samtempe eluzante la multajn varbprospektojn. Krome la FIAT-prospektoj bone demonstras la aŭto-terminaron.
- 522 *Aviadiloj*
 Kio povas pli vekti la fantazion de infanoj ol subĉiela aviadila giganto atinganta ĉiun lokon de la tero en malmultaj horoj, sed same la pli malgrandaj, la sportaviadiloj vekas la eternan sopiron al detera libero. Vizitante la aerodromojn, la grupoj povus fari fotoreportaĵojn, kolekti prospektojn pri diversaj flugvojoj, lude ili povus "flugi" al plej malproksimaj landoj, ili povus prove verki aviadilan terminaron.
- 523 *Spacveturado*
 Per la spacveturado la homo sukcesis por la unua fojo trarompi ŝajne ĝis nun eternajn leĝojn. Novaj grandegaj perspektivoj malfermiĝas. Ne nur filozofe oni povas diri, ke la homaro estas survoje al nekonataj celoj. Okupiĝo pri la tekniko de spacveturado povas riĉigi la lingvan scipovon, doni la senton, ke la homaro entute petata al komuna agado. Oni povus projekti raketojn desegne aŭ eĉ modele, povus kontakti kun astronautoj, petante de ili fotojn, aŭ (pagipovaj landoj) povus donaci lumbildojn pri luno kaj tero de ekstere.
- 524 *Transistoro*
 Amplifa elemento el duonkondukantoj kun minimume 3 elektrodoj, kiuj efikas same kiel elektrona tubo, aŭ nur komunlingve: ricevaparato kun transistoroj (laŭ PIV). Tio estas kampo nur por "specialistoj" inter la infanoj. Tamen ili preskaŭ ĉiam ekzistas. Al mi venis iam knabo, transdonante al mi alumetan skatoleton, en kiun li estis konstruinta tri elektrodojn. Kaj la ricevilo funkciis. Simile povus agi la grupoj, interŝanĝante sperton sur tiu ĉi kampo. Tiel la unua grupo povus sendi planon al la alia — se necese kunsendi la teknikan materialon — detale priskribi (esperantlingve) la konstrumanieron kaj tiel konstrui ĝin.
- 53 *Hobioj*
 Hobio estas tiu okupiĝo de homoj, kiu senkondiĉe servas ilian distron. Pro tio lasu al viaj infanoj la plej grandan liberon mem elekti ilian hobion. Tiu ĉi okupiĝo ne nepre devas okazi dum instrua tempo, ĝi ĉefe apartenu al libera tempo.
- 531 *Kolektado kaj interŝanĝo de poŝtmarkoj*
 Jen parada ĉevaleto de multaj esperantistoj. Tiu grupo, kiu okupiĝas pri tiu ĉi temo multe helpas aranĝi ekspoziciojn. Bonega ebleco por infanoj el rekte ne pagipovaj landoj pagi per poŝtmarkoj por ricevitaj objektoj.
- 532 *Amantoj de popmuziko — diskoservo*
 Preskaŭ ĉiuj pli aĝaj gelernantoj fervore kolektas tian modernan

- muzikon. Tuta aro da novaj muzikformoj ekestis. Per prunedono aŭ rekta interŝanĝo la muzikamantoj ĉiam denove povas demonstri ĉe la aliaj lerneĵoj la praktikan sencon de Esperanto.
- 533 *Foto-amatoroj*
 Komune planitaj ekspozicioj ĉiam denove stimulas la diversajn motivojn el ilia ĉirkaŭaĵo. Restas sufiĉe da fakaj demandoj leterdiskuteblaj.
- 534 *Sonĉasistoj per sonbendo*
 Kia bruo estas en nia klaso — kia bruo dum lerneja paŭzo — kiel la instruisto instruas — trafika bruo sur la strato — bruo en futbalstadio — ktp. estus interalie temoj por la ĉasistoj, kaj la neatenditaj paroloj kaj esprimaĵoj estas la plej efikaj.
- 535 *Kolektado kaj interŝanĝo de bildkartoj*
 Diligente kolektitaj kaj prudente interŝanĝitaj bildkartoj ĉiam estas ornamaĵo de ĉiu ekspozicio. Ankaŭ la kolektantoj multe helpas la instruadon, disponigante taŭgajn bildkartojn.
- 536 *Kolektado kaj interŝanĝo de popfotoj*
 Geinstruistoj, kiuj samtempe ankaŭ estas patroj aŭ patrinoj povus multe rakonti pri la aspektoj de la ĉambroj de siaj grandaj infanoj. Do, sugestis al la interesigantaj infanoj, en senco de nia intenco estas taŭge. Lasu ilin kolekti la belajn, neblajn, ĉarmajn, terurajn ne eviteblajn bildojn. Eĉ toleru la aliroĉon sur la muron de via klasĉambro, kondiĉe ke la bildoj estas senditaj de la ĝemela klaso, kaj pro nenio esprimu vian malplaĉon.
- 537 *Intervjurondo*
 La grupo povus per sonbenda aparato intervjui la publikon pri la plej diversaj temoj, speciale ankaŭ pri Esperanto, esperantlingve prepari ĝin kaj sendi la intervjuojn al la "kolegoj" de la ĝemela klaso.
- 538 *Pentristoj*
 Infanoj, kiuj lerte pentras, grupigu en komuna rondo, por temigi objektojn pentrotajn. Interkonsente kun la ĝemela grupo difinitaj temoj en konkursa maniero demonstrus la internacian linion.
- 539 *Modaj aferoj*
 Tie ĉi interesigantaj knabinoj trovas multifacetan agadkampon. Kiel riĉa estas la modo, kaj kiel ŝanĝiĝema. Eltondi la bildojn el la ĵurnaloj, ordigi ilin laŭ modaj vidpunktoj, laŭ tempo kaj okazo, tiu ĉi okupiĝo nutras la knabinojn por la tuta jaro.
- 5310 *Diaspecialistoj*
 Amata hobia de multaj personoj, kiuj grandstile fotas diapozitive por poste kaŝi la lumbildojn preskaŭ eterne en ŝrankon. Por la internacia rondo tia sorto estas evitebla. La motivaj objektoj estas senlimaj kaj pro tio same la reciproka interŝanĝo.
- 6 La organizado de individua aktiveco**
 Starigi internaciajn, individuajn kontaktojn estas facile, teni ilin ne. Baldaŭ post la unua entuziasmo la aktiveco rapide lamiĝas, kaj la morto estas proksima. Por eviti tian fiaskon, la instruisto zorgeme organizu la aferon. Se du infanoj jam persone kontaktiĝis, — tiam la afero estas en ordo. Aliflanke la instruistoj devas trovi la ĝustan partneron. Persona gusto kaj inklino, komunaj interesoj estas la kondiĉoj por daŭra kontakto. Se ekzemple unu infano ŝatas boksadon, la dua nur muzikon, la ŝanco por pli longa kontakto estas nulo.
 En la klaso surmurigita estu listo indikanta la infanajn parojn, kiuj reciproke korespondas. Ĉiu, kiu sendas aŭ ricevas leteron aŭ alian sendaĵon, ricevas poenton. Tiu, kiu kolektas la plej multon, premiigu. Do, la instruisto donu la ĝustan direkton, sed ne pli.

61 *La decemeco de la instruisto*

Kompreneble la instruisto ne enmiksi sin en la enhavon de la leteroj, skribitaj aŭ ricevitaĵoj de la infanoj. Li nur helpu tiam, kiam la infano deziras lian helpon. En la unua tempo de la privata korespondado pro lingvaj mankoj la infanoj ofte pretendas konsilojn eĉ sugestojn. Tiaj petoj de la infanoj esprimas konfidencon kaj postulas la diskretecon de la instruisto.

62 *La strikta observado de privata korespondado*

La instruisto ne kontrolu la regulecon de la privata korespondado, sed observadu ĝin. Mi supre (6) jam aludis formon de observado. Ofte helpas la t.n. horo de korespondado. Dum la studhoru ĉiu infano skribas sian leteron, kaj la instruisto prizorgu la samtagan ekspedadon. Ĉar privataj leteroj apartenas ankaŭ al skribstilaj ekzercoj, la instruisto kelkfoje lasu skribi ilin kiel hejman taskon.

III *Fina rimarko*

Ankoraŭ mankas multaj aliaj. Mankas multe pli bonaj. Gravajn eĉ mi ne menciis. Do, restas por miaj ŝatataĵoj gekolegoj sufiĉe da spaco por profunda kritiko — kaj profunda kunlaboro. Ambaŭ mi atendas.

Internacia Ligo De Esperanto-Instruistoj

Estraro de la Ligo

- 1) Prezidanto: Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- 2) Vicprezidanto: Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapeŝto X, (Hungarujo)
- 3) Sekretario: D-ro Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- 4) Vicsekretario: S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- 5) Kasisto: S-ro Olle Olssen, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo)

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralio: Ivan T.M. Maddern, Box 411, Morwell 3840, Victoria
 Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6 -18/8/13, A-1030 Wien
 Belgujo: G. Pirlot, Torhoutsteenweg 17, B-8400 Oostende
 Britujo: Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP
- Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhoda, Sofia
 Danlando: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre
 Finnlando: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenkuo 4, SF-33820 Tampere 82
 Francujo: F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
 Germanujo: Hermann Behrmann, Bahnhofstr. 54, D-4972 Löhne 1
 Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno
 Hispanujo: Felipe Gonzales Del Pino, Dona Maria de Molina 15c, Sevilla
- Hungarujo: Marta Cser, Zelay út. 10-14, H-1368 Budapeŝto V
 Israelo: Ron Aser, Raanana, Aŝer 5
 Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
 Italujo: Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
 Japanujo: Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343
 Jugoslavio: Miodgrad Stojanoviĉ, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
- Kanado: George Du Temple, 930 Ardmoo Drive, R.R.2, Sydney, B.C.
- Kolombio: Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin
 Nederlando: O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl-1719
 Norvegujo: Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
 Nov-Zelando: F. Fleming, P.O. Box 5042, Wellington
 Pollando: Teresa Nemere, str. J. Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń
 Rumanujo: Ignat Bociort, D-dul Eroilor nr. 7/D, et. 1, ap. 5, Timisoara
 Suda Koreujo: Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
- Svedujo: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, S-421 74 Västra Frölunda
- Svislando: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco
 Usono: John L. Lewine, West Stockbridge, Mass. 01266

Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, poŝta 5, Zdaboř V-28, CS-261 05 Přeboram
 Germanujo DDR: Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstrasse 37, DDR 195 Neuruppin
 Kubo: Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 283, Ciego de Avila
 Sovet-Unio: Johannes Palu, Sölme 21, SU-200016 Tallin, Eostri NSV
 Zairo: Antoine-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu)